

EGYE KÖNYVTÁR
BALATONARJÁN

HUNGARA VIVO

2
1983
13,– Ft



Ni entreprenas produktadon kaj surlokan muntadon de instalaĵoj por komuncelaj ejoj en Hungario kaj eksterlando.

BUBIV

BUDAPESTI BÚTORIPARI VÁLLALAT

1043 BUDAPEST, LÓRÁNTFFY ZS. U. 15/B

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 2
(108)

ENHAVO

Parolas la Honora Komitato 42
László, I.: Departemento Csongrád 44
Szilágyi, J.: La distra vivo en Aquincum dum la Romia epoko (B. *Golden*) 46
Bálint, Sz.: Parlamentejo – simbolo de Budapeŝto 48
Fejes, M.: Pegazo – tipe hungara ĉevalo 50
Rakovszky, Zs.: Vitreroj de la tempo (I. *Szabó*) 51
Illyés, Gy.: Antikva volbo (I. *Szabó*) 51
Weöres, S.: Daktilo (I. *Szabó*) 51
Szabó, I.: Manĝi kaj trinki hungare 52
Rubriko de fakterminoj (E. *Fenyvesi*) 54
Botos, I.: Gustumu la hungaran! 55
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 8. 56
Gergely, M.: Idealoj kaj epokoj 58
Fejes, M.: Gyula Juhász 1883-1937 59
Juhász, Gy.: Nova konfeso (M. *Fejes*) 59
Juhász, Gy.: Infantombejo (I. *Szabó*) 59
Panoramo 60
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 63
László, F.: La akvomastrumado antaŭ la hungara Parlamento (E. *Fenyvesi*) 64
Haŝek, J.: La brava soldato Ŝvejk (O. *Knĉhal*) 70
Pallós, E.: Monda Turismo 72
Fenyvesi, E.: Malfermita letero pri proza tradukado 75
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 76
Recenzoj de N. *Andrianova*, K. *Pov* kaj O. *Knĉhal* 77
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 79
Korespondi deziras, Leterkesto 80

Sur la titolpaĝo: Matias-preĝejo en Budapeŝto (Foto de Z. Fejér)

Tre diversaj verkoj kaj artikoloj...

trovis lokon en tiu ĉi numero de HV. Sur la sekvaj paĝoj legeblas la daŭrigo de la intervjua serio «Parolas la Honora Komitato». Tiuj ĉi intervjuoj elokvente pruvas, kiel gravan atenton donas elstaraj figuroj de la hungara socia vivo al la internacilingva problemo kaj speciale al la UK, okazonta en Budapeŝto. En la vico de la hungaraj regionoj nun oni povas konatiĝi kun Departemento Csongrád, kiu – malgraŭ sia malproksimeco de Budapeŝto – certe meritos la atenton de eksterlandaj esperantistoj, partoprenantaj la UK-on en Budapeŝto. La belan situon de Budapeŝto multaj turistoj admiris jam; ne hazarde tiu bela situo altiris la atenton de la romianoj jam antaŭ 2000 jaroj. Ĉi tie ili konstruis sian urbeton *Aquincum*, kies ruinojn vidi valoras ĉ. 20-minutan aŭtobusan veturadon. Ŝatantoj de kulturhistoriaj temoj povas legi ĉi-numere pri tio, kiel la loĝantoj de tiu ĉi romia urbeto amuziĝis.

Tiuj, kiuj tute ne volos forlasi la urbocentron, proponas sin interesa ekskurseto tra la plej belaj salonoj de la hungara Parlamentejo. Nia ĉiĉerono Szilárd *Bálint* per belaj fotoj prezentas al la estontaj kongresanoj tiun ĉi unikan konstruaĵon. Márton *Fejes* artikolas pri specifa temo; rolo de la poezio en la nuntempa Hungario. Imre *Szabó* invitas konatiĝi kun aferoj pli konkretaj: hungaraj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Li inkluzivas en la artikolo ankaŭ kelkajn receptojn – ĉu iuj el niaj legantoj provos prepari la koncernajn manĝojn? Ni ricevos volonte informojn pri tio.

Imre *Botos* daŭrigas la serion pri la hungara lingvo: ĉu iuj havis la kuraĝon gustumi tiun ĉi lingvon, certe ne facilan? Árpád *Rátkai* diskutveke pritraktas la problemaron pri sennaciismo – ni volonte aŭdus la opinion de niaj legantoj pri liaj konkludoj. Mihály *Gergely* lanĉas interesan kompromisan proponon pri la lerneja enkonduko de la instruado de Esperanto. *Rátkai* okupiĝis pri la pasinto, *Gergely* pri la futuro de Esperanto – Elizabeta *Pallós*, vicprezidanto de Monda Turismo parolas pri ĝia nuna aplikado en la turismo.

Literaturamantoj povas legi poemojn de Gyula *Juhász* kaj fragmenton el la fama romano «La brava soldato Ŝvejk» de Jaroslav *Haŝek* – ambaŭ aŭtoroj naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Ervin *Fenyvesi* tuŝas eĉ du aspektojn de la tradukado: en sia «Malfermita letero» li pritraktas la problemojn de la proza tradukado ĝenerale, dum en alia artikolo li lanĉas fakterminojn.

Ĉu plaĉa oferto aŭ ne? Volonte ni ricevus komentojn pri niaj lastaj numeroj, tiom pli, ke la rubrikestro de nia «Leterkesto» de kelka tempo plendas pri senlaboreco...

Parolas la Honora Komitato...

En la pasinta numero de Hungara Vivo ni komencis publikigi intervjuojn kun la membroj de la Honora Komitato. La tri demandoj, direktitaj al ili, estis la jenaj:

1. Kiuj pensoj, sentoj vekiĝis en vi, kiam vi akceptis la inviton esti membro de la Honora Komitato?

2. UN deklaris la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. Ankaŭ la Universala Kongreso pritraktos la problemojn de la komunikado, kiel sian ĉeftemon. Vi estas ofta kaj aktiva partoprenanto de internaciaj rilatoj, ja tion postulas viaj profesio kaj ofico. Kiel vi pritaksas la komunikajn kaj ĉefe lingvajn malfacilaĵojn en tiuj rilatoj?

3. Ĉu vi vidas iun elirvojon, kiel eblus, pli ol ĝis nun, moderigi aŭ solvi la multfacetajn lingvajn malfacilaĵojn en la internacia komunikado?

Zoltán Szépvölgyi, urbestro de Budapeŝto:



1. Budapeŝto, la ĉefurbo de nia patrujo, jam la trian fojon gastigas la Universalan Kongreson de Esperanto. Tio honorigas la urbon, ĝian loĝantaron, sed ankaŭ min kiel urbestron de Budapeŝto, ke mi povos saluti la 68-an kongreson de tiu humanisma kaj internaciisma monda kulturmovado, kies plurmil reprezentantojn ni bonvenigas kun la apreco al la nobla afero, por kiu ili ĉiuj luktas. Kiel membro de la Honora Komitato, mi strebas helpi, ke ili fartu bone en gastama etoso, ke senĝene kaj sukcese realiĝu la riĉa programo de tiu grava internacia renkontiĝo.

Mi mem ne estas esperantisto, nur simpatianto de la internacia lingvo, sed mi scias, ke jam en la pasinto estis la hungara Esperanto-movado reputacia partoprenanto kaj evoluiganto de la monda movado por solvi racie la homaran multlingvecon. Unu el la ĉefaj kolonoj estis ĉe ni la Hungaria Esperantista Societo Laborista, kies membroj apartenis al la klera kaj konscia tavolo de la laboristaro, kaj ili, pere de sia lingvoscio tenis senperan, amikan korespondan kontakton kun la laboristoj en aliaj landoj. Per tio vastiĝis ankaŭ ilia horizonto. La alia forto estis la t.n. Budapeŝta Skolo, kiu grave akcelis la disvolviĝon kaj evoluon de la originalaj Esperantaj literaturo kaj poezio. La internacia kunlaborantaro grupiĝis ĉirkaŭ Julio Baghy kaj d-ro Kálmán Kalocsay, mondfamaj hungaraj figuroj de la Esperantaj literaturo kaj tradukarto, respektive ĉirkaŭ la kultura revuo Literatura Mondo, redaktita far ili.

Budapeŝtanoj estis akademiano Géza Bárczi, unu el la plej grandaj sciencistoj de la hungara lingvistiko; akademiano Mór Korach, eminenta sciencisto de la teknika kemio. Ili ambaŭ faris multe por la afero de la internacia lingvo per siaj hungaraj kaj Esperantaj publikaĵoj, ili ambaŭ estis honoraj prezidantoj de Hungara Esperanto-Asocio.

Budapeŝto havas signifan rolon en la historio de la internacia Esperanto-movado. Mi esperas, ke ankaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso altigos la prestiĝon de nia ĉefurbo ankaŭ en tiu rilato.

2. La Ĉefurba Konsilio havas variajn kontaktojn kun multaj ĉefurboj. Estas do evidente, ke la interpretistoj estas ĉiamaj rolantoj en tiuj kontaktoj, ĉar sen ili ni ja nepre ne povus transponti la lingvajn diferencojn. Tamen dum la interpretado, ni multfoje spertas la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj influas la nivelon de la necesaj spertointerŝanĝoj inter la gvidantoj de la ĉefurboj kaj ties institutoj, respektive inter la fakuloj de la urbanistiko. En tiuj rilatoj do ankaŭ ni sentas la malfacile transponteblajn komunikajn problemojn, kiuj rezultas el la monda diverslingveco. Simila estas la situacio en la diversaj aranĝaĵoj, kiuj okazas ĝuste en Budapeŝto, aŭ en tiuj multaj eksterlandaj eventoj, kiujn partoprenas la reprezentantoj de nia patrujo.

3. Estus bone, se la lingvaj malfacilaĵoj estus transponteblaj en ĉiuspecaj interŝtataj kaj interurbaj kontaktoj de la mondo, same kiel en la diversaj internaciaj kunvenoj de la esperantistoj, kie ne plu estas bezonataj interpretistoj, ĉar ili ĉiuj povas interkompreniĝi per la internacia lingvo. Tamen mi scias, ke tio ankoraŭ ne eblas. Por la realiĝo de tiu epokfara ŝanĝo necesas ankoraŭ tre longa tempo, internacia traktado kaj multe da komprenemo kaj pacienco. Mi scias, ke la strategio de Esperanto-movado celas tion. Tial mi opinias ĝusta, ke Esperanto-movado organizas sian kongreson ĉiujare en alia lando, ĉar tiel la loĝantaro de la gastiganta lando povas konatiĝi kun la celoj, fortostreĉoj kaj konveneco de la proponoj de la senĉese vastiĝanta parolantaro de la internacia lingvo.

Fine permesu al mi saluti elkore kaj estime en la nomo de la Budapeŝta loĝantaro, Ĉefurba Konsilio kaj ankaŭ en mia propra nomo, la partoprenantojn de la Universala Kongreso de Esperanto en nia ĉefurbo. Mi deziras, ke viaj konsultiĝoj alportu riĉajn rezultojn kaj kontribuu al la progresemaj tradicioj.

Mi scias, ke la laboro de la Universala Kongreso estas multfaceta, kaj ankaŭ ĝia programo estas sufiĉe plenŝtopita. Tamen mi petas, ke en la paŭzoj de la kunsidoj konatiĝu kun nia bela ĉefurbo, kun niaj atingaĵoj, kun la ĉiutaga laboro de nia gastama kaj diligenta popolo. Vi nepre spertos, ke Budapeŝto akceptas siajn gastojn estime kaj kun sincera amikeco. Mi deziras, ke vi ĉiuj fartu bone kaj kun valoraj spertoj, agrablaj kaj daŭraj memoroj reiru al viaj hejmlandoj, kunportu bonan famon pri nia ĉefurbo tra la tuta mondo.

Sinjorino Lajosné Duschek,
prezidanto de la
Nacia Konsilio
de Hungaraj Virinoj

1. La virinoj pli kaj pli konscias pri sia respondeco pro la monda sorto, ili partoprenas pli kaj pli multnombre la lukton por certigi la progreson, pacon kaj estonton de la homaro. Tiu batalo okazas sur pluraj kampoj, sur pluraj niveloj kaj per multaj rimedoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto-movado apartenas al la plej gravaj, ja ĝi celas faciligi kaj helpi la interpopolan kompreniĝon. Tial ĝoje mi akceptas esti membro de la Honora Komitato.

2. Kiel partoprenanto de la internacia movado de virinoj, mi ofte veturas eksterlanden, kaj ankaŭ nin ofte renkontas eksterlandaj delegitaroj. Kun miaj gastoj, gastigantoj mi parolas kutime pere de interpretistoj. Pro la multlingveco de la homaro tio estas praktike neevitebla sur multaj kampoj de la internaciaj kontaktoj. La plimulto de miaj interpretistoj estis ĝis nun virinoj. Kaj tio ne estas hazardo: inter la profesiaj interpretistoj virinoj estas ĉie la plimulto. Tiu situacio formiĝis verŝajne pro tio, ĉar interpreti estas demando ne nur de lingvoscio, sed ĝi postulas kapablon adaptiĝi kaj identiĝi, kiu karakterizas virinojn plie ol virojn. Cetere, lerni fremdajn lingvojn estas por virinoj same malfacile kiel por viroj. Tio eĉ plie malfacilas, se eklernas lingvon edziniĝinta, infanhava virino, kiu bezonas ĝin por sia laboro, profesio aŭ simple por sia kleriĝo aŭ por foj-foja eksterlanda vojaĝo. Ja pro ilia pli grava rolo en la prizorgo de la familio, en ilia kazo ĉiuspeca lernado postulas pli grandajn fortostreĉojn.

3. La disvastiĝo de Esperanto-movado en milionoj plifortigas la konscion pri la egaleco, samrangeco inter homoj, popoloj, nacioj; la fidon povi detrui la lingvajn kaj aliajn barojn, kiuj disigas la homojn. Tial la progresemaj sociaj kaj politikaj movadoj – inter ili ankaŭ la movado de virinoj – kaj Esperanto-movado estas naturaj kunbatalantoj. Krom siaj specifaj celoj, ili ja luktas ankaŭ por komunaj celoj, por krei firman bazon konservi la pacon, la pacan kunekzistadon, akiri la interpopolan reciprokan kompreniĝon, plifortigi la kunlaboron. Tiuj celoj postulas, ke la progresemaj movadoj fortigu siajn kontaktojn, kunlaboron. Kaj ĉio ĉi servas ankaŭ la realiĝon de la celoj de Esperanto-movado. Tion ni helpas flanke de la Nacia Konsilio de Hungaraj Virinoj tiel, ke ni instigas, helpas Esperanto-lernadon de la virinoj; ni proponas alproprigi la internacian lingvon ĉefe por tiuj virinoj, kiuj pro la troa okupiteco havas entreprenemon por lingvo, kies ellerno bezonas malpli da tempo kaj energio.

Bertalan Farkas,
kosmonaŭto



1. Ĉar iam ankaŭ mi mem lernis Esperanton – kvankam pro la granda okupiteco kaj multaj studoj jam delonge mi ne havas tempon por okupiĝi pri la internacia lingvo –, mi sentas min esence esperantisto. Tial mi ĝojas, ke, ankaŭ kiel membro de la Honora Komitato, mi povas esprimi mian konsenton pri la celoj de la movado.

2. En la internacia komunikado parto de la telekomunikado okazas jam per satelitoj – ankaŭ tio estas rezulto de la procezo ekregi la kosmon. Sed mem la ĉefrolantoj de la kosmaj esploroj; la diverslingvaj sciencistoj kaj kosmonaŭtoj – kies laboro ebligis la gravajn rezultojn de la satelita telekomunikado –, en la kontaktoj kaj spertinterŝanĝoj inter si ofte luktas kun la lingvaj malfacilaĵoj de la persona „proksima komunikado". Kaj tio okazas eĉ se la alilingvaj esploristoj kaj kosmonaŭtoj, partoprenantaj en la soveta Interkosmo, sufiĉe bone ellernas la rusan lingvon. La lingvajn problemojn de la spaca navigado mi jam klarigis en pli frua intervjuo (Hungara Vivo n-ro 1/1981). Nun mi ne volas tiun ripeti, pri la temo mi mencias nur, ke la lingvaĵo de la spaca navigado estas enorme malfacila eĉ por la homoj, kies gepatra lingvo estas la rusa aŭ la angla. En tiu faka lingvo abundas mallongigoj, specifaj esprimoj, vort-kunmetoj. Estas do imageble, kiom malfacilis ĝi por la partoprenantoj de la komuna soveta-Usona spacveturado; aŭ por tiuj diversnaciaj esploristoj kaj kosmonaŭtoj, kiuj iugrade partoprenis la sovetan aŭ Usonan spacprogramon. Evidentas, ke ju pli malsimplas iu tradicia aŭ nova scienco, des pli estas „paneigaj" la lingvaj malfacilaĵoj en ties internaciaj kontaktoj.

3. Estas do evidente, ke en la scienca vivo kaj internacia kunlaboro por ekregi la kosmon, pli kaj pli estas sentebla la neceso apliki neŭtralan internacian lingvon. Eĉ pro tio, ĉar en la internacia scienca vivo nun regas la angla lingvo, kaj tiuj esploristoj, kies gepatra lingvo estas ne la angla, scias bone, kiajn malavantaĝojn tio rezultigas. Spite al ĉio ĉi, nun ankaŭ mi mem strebas ellerni la anglan lingvon dum kiel eble plej mallonga tempo, por ke mi povu legi en la originalo krom la ruslingvan, ankaŭ la anglan fakliteraturon. Sed ŝajnas, ke hodiaŭ jam ne plu sufiĉas scii du tiel nomatajn mondlingvojn por povi komuniki konvene kun la alilingvaj fakuloj de sciencoj kaj tekniko. Tial estus tre bone, se la Monda Komunika Jaro gvidus la laboristojn de sciencoj al la rekono, ke post la signifa faciliĝo kaj rapidiĝo de la komunikiĝo inter malproksimaj kontinentoj per la satelita telekomunikado – estas jam tempo por transponti la lingvajn malfacilaĵojn de la „proksima komunikado" inter la diverslingvaj homoj. Per internacia lingvo interkonsentita. La komencajn paŝojn devus fari la sciencaj laboruloj, orientante la ŝtatajn gvidantojn. La registaroj, por solvi tiun problemon, povus sin apogi ĉefe al la scienculoj; ja tiuj povus plej efike influi la politikistojn kaj la tutan socion.

Imre *Szenes*

Regionoj de Hungario



Departemento Csongrád

Ankaŭ ĉi tiu suda departemento de Hungario apartenas al tiuj, kies tuta teritorio situas sur la Granda Ebenaĵo. Tiel la regionoj de la departemento geografie ne ofertas specialajn variaĵojn. Tamen la turismaj vidindaĵoj, troviĝeblaj en ĝiaj urboj, allogas dum la tuta jaro multajn vizitantojn.

La administra centro de la departemento: *Szeged* (seged) estas laŭ la nombro de la loĝantaro (ĉ. 130 000) la kvina urbo de Hungario. Szeged havas riĉan estinton kaj el kultura, kaj el ekonomia vidpunkto. La bone kaj plaĉe konstruita panoramo de la urbo, krome la tradicie aranĝataj Liberaeraj Ludoj sur la placo antaŭ la katedralo, jen estas la allogaj faktoroj, kiuj konstante altiras multajn vizitantojn.

Dum la mezepoko la urbo havis gravan rolon strategian, nome ĝi estis unu el la elirpunktoj de la militiroj kontraŭ la turka invado. Fine de la pasinta jarcento la urbon trafis katastrofo: en 1879 Tiso inundis ĝin. La inundakvo detruis ĉ. 6000 domojn kaj propre forlavis la tutan urbon de sur la mapo. Post la memorinda inundo ricevis *Szeged* la hodiaŭan, laŭplane konstruitajn strukturon kaj aspekton. La rekonstruon de la detruita urbo helpis ankaŭ internacia kontribuo.

Post la dua mondmilito *Szeged* fariĝis unu el la centroj de la malpeza industrio en Hungario. Proksime al la urbo oni trovis signifan kvanton de nafto kaj tergaso: la pli granda parto de la enlanda produktado de nafto devenas de ĉi tie.

Ankaŭ la kultura vivo de la urbo evoluis. Krom la Scienca kaj Medicina Universitatoj en *Szeged* funkcias sciencaj esplorinstitutoj, altlernejoj kaj pli ol dek kolegioj. El inter la provincaj teatroj de la lando la Nacia Teatro de Szeged estis la unua, kiu kreis konstantan oper-ensemblon.

La urbo abundas je altnivelaj artobjektoj kaj arkitekturaj specialaĵoj. La plej monumenta kaj rimarkinda konstruaĵo de la urbo estas la du-tura romkatolika katedralo (katedralo de Sankta Promeso). Ĝi estas unu el la plej grandaj preĝejoj de Hungario. Ĝia orgeno – havanta 10 180 orgenfajfilojn – estas la dua plej granda tiaspeca instrumento en Eŭropo. Sur la placo antaŭ la katedralo oni aranĝas de jaro al jaro liberaerajn ludojn, kies arta rango jam estas konata ankaŭ ekster la limoj de Hungario.

La alia urboparto „Uj Szeged" (Nova Seged), situanta sur la maldekstra bordo, estas multe malpli granda ol la historia urbo. Ĝi estas nove konstruita urboparto en speciala natura medio.

Krom Szeged, la departemento havas ankoraŭ kelkajn aliajn viglajn urbojn. Ni menciu kiel unuan el ili *Makó*, kiu situas oriente de Szeged, ĉe la norda bordo de la rivero Maroŝ. *Makó* havas 30 000 loĝantojn; unu el ĝiaj specialaĵoj estas la tie produktata cepo, kiu estas grava spico de la hungara kuirarto.

Irante norden, ni trovas *Hódmezővásárhely* (hodmezovaŝarhej). Ĝi havas 54 000 loĝantojn. Ĝia historio komenciĝis en la 13a jarcento. Dum la

Internaĵo de preĝejo en Szeged (Foto de Z. Fejér)

La bordo de Tiso en Szeged



Makó – birdokule

1800-aj jaroj *Hódmezővásárhely* fariĝis unu el la movadaj centroj de la agrara proletaro.

En la muzeo de la urbo oni trovas gravajn popolartajn objektojn. *Hódmezővásárhely* estis la plej granda potfarista centro de la Ebenaĵo, kaj fidele ĝi konservis la tradician stilon.

Szentes (senteŝ) kun 32 000 loĝantoj apartenas al tiuj urboj de la departemento, kiuj havas sport- kaj turismajn eblojn. La 78°-an termalakvon oni uzas ne nur por la banejoj, sed ĝi estas utiligata ankaŭ en la ĝardenoj de la diantoj kaj rozoj. Ĉi tiuj floroj de Szentes havas internacian famon.

La urbo *Csongrád* (ĉongrad) havanta 23 000 loĝantojn, situas ĉe la okcidenta bordo de Tiso. Ĝia specialaĵo estas la pelt-industrio. La borda plaĝo de Tiso kun la enfluejo de la rivero *Kőrös* (koeroŝ) estas vasta kaj tre agrabla ripozejo.

La departemento havas riĉajn tradiciojn en la E-movado. En *Szeged* la unuaj esperantistoj aperis de 1900 kaj la loka movado komencis disvolviĝi ekde 1905. En la jaro 1912 oficiale ekfunkciis la Szeged-a Grupo de la Hungarlanda Esperanto-Societo. En 1914 oni fondis la Laboristan Ligon Esperantistan de Szeged. La funkciado de ambaŭ societoj estis fruktodona dum longaj jaroj. La hungara poeto Gyula *Juhász* fariĝis entuziasma simpatianto de Esperanto kaj forte li subtenis la laboron de ambaŭ E-societoj en la urbo.

En *Hódmezővásárhely* János *Medgyesi,* reformita instruisto estis la iniciatinto de la movado en la jaro 1907. En 1910 li eldonis lernolibron Esperantan. Kvankam li intertempe transloĝiĝis al Budapeŝto, poste al *Temesvár* (nun Timiŝoara en Rumanio), ĉiusomere li gvidis lingvokursojn en *Hódmezővásárhely.*

„Dancistino" – skulptaĵo de Ferenc Medgyessy, naskita de departemento Csongrád

De 1909 ekzistis unuopaj esperantistoj en *Makó,* sed memstaran grupon ili povis fondi nur en 1932. Poste baldaŭ, en 1934 dekreto de la ministro pri internaj aferoj ĉesigis en la tuta lando la funkciadon de la laboristaj E-grupoj.

Kompreneble en la menciitaj urboj nuntempe denove vivas kaj funkcias lokaj grupoj.

La plej grava esperantista institucio en la departemento estas la Hungara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko en Szeged.

István *László*

Urboparto de Szeged. Foto de Z. Fejér



János Szilágyi

La distra vivo en Aquincum dum la Romia epoko

Laŭ antikva eldiro: „Ĉasi, sin bani, ludi, ridi – tio estas la vera vivo." Alia „ora diraĵo" tiel sonis: „Irado al la banejo, la vino kaj Venera (la amo) rapidigas nian sorton." Kiam la „parvenuo" strebis al populareco, li pagis por amfiteatra aŭ teatra prezentado, sportkonkurso, senpagaj banbiletoj por virinoj, kaj publika festenado. La organizado de senpagaj distraj ebloj estis utila narkotaĵo por la malriĉaj amasoj.

La nombro de festotagoj en Aquincum ne povis esti malmultaj. Okaze de Novjaro la homoj distribuis donacojn unu al la aliaj. Estis trovitaj diskoj el bakita argilo, ekz. kun la bildo de *Mercurius,* portanta profiton. Tiuj ĉi servis por anstataŭi la novjaran oferkukon. Precipe la dioj *Mercurius* kaj *Isis-Fortuna* tiel rolis en la kolektiva konscio, por ke ili portu pli feliĉan novan jaron. La novjara solenaĵo – la 3-an de januaro – samtempe estis la tago de la omaĝo al la imperiestro.

Verŝajne estis solenitaj ankaŭ en Aquincum la festoj ĝenerale ŝatataj tra la tuta imperio, kiel ekz. *Quinquatrus* de la diino *Minerva* inter la 15-a kaj la 23-a de marto, *Megalesia* de *Kibele-Magna Mater* dum la tagoj de la 4-a ĝis la 10-a de aprilo, kaj *Ploiaphesia* de la diino *Isis* la 5-an de marto. Oni certe aranĝis tie ĉi la jaran festotagon de la provinca kunveno, la *concilium provinciae.* Sed la karaktero de Aquincum estis militista, kaj ĝuste pro tio la emfazo estis metita unuavice sur festojn de la militistaro.

La ĉeffesto de la legioj estis ĝenerale la datreveno de ilia formiĝo. Kaze de la „2-a Helpa Legio", tiu ĉi tago estis la 7-a de marto. La flugilhava Pegazo fariĝis la blazonbesto, la simbolo de la legio ĝuste, ĉar marto – laŭ la kalkulo de la astronomoj – estis la naskiĝmonato de la flugilhava ĉevalo.

Verŝajne oni ofte festis en tiu ĉi militista centro la setladon aŭ retiriĝon de amase eks-soldatiĝintaj veteranoj. Por la provincoj unu aŭ alia imperiestro estis relative pli populara. Oni kutimis same festi la datrevenon de tiuj ĉi. Ŝtona monumento de Aquincum de proks. 165 p.K. atestas ekz. la feston de la unua de aŭgusto. Tutan jarcenton antaŭe Klaŭdio la Unua naskiĝis en tiu tago, kaj Oktavio tiam akceptis sian unuan *consulatus.* Kaj okaze de la datreveno de Antonius Pius, eĉ dum la 4-a jc. oni ankoraŭ organizis amfiteatrajn ludojn.

Oni same festis la datrevenojn de la inaŭguro de gravaj publikaj konstruaĵoj, ekz. *Neptunalia,* la jubileon de la ekfunkcio de la akvokondukiloj. Ankaŭ en Aquincum estis konstruita *aquaeductus!*

La enterigaj mutualaj societoj ofte organizis publikajn vespermanĝojn, ekz. okaze de la datreveno de la fina honoro de la mortintaj membroj. La celebrado de la kristana dimanĉo, supozeble datiĝas post 321.

Estas rimarkinde, ke ĝis nun oni trovis definitive certajn spurojn de vendejo de drinkaĵoj kaj gastejo (*deversorium hospitium*) nur apud la suda pordego de la „civila urbo" – ekster la urbomuro –: ĝi estis longa, kvarangula konstruaĵo; ĝia korto – en la interno de la konstruaĵo – montras trapezan formon; la pordego rigardanta al la vojo evidente havis konsideron por la trafiko de la ŝoseo, dum la enirejo malfermita en la orienta direkto ebligis al la garnizono de la serio de danubbordaj fortikaĵoj pli oportunan alproksimigon. Mallarĝa halo (stalo? deponejo?) etendiĝas laŭ la korto apud unu el ĝiaj lateroj. Ĝia enirejo povis esti nur ĉe unu el la du ekstremaĵoj aŭ du konstruaĵ-aloj estis konstruitaj ĉe la alia latero de la interna korto, tio estas, laŭ la vojo kondukanta en la direkto al la suda pordego de la urbo. La pli granda ĉambro, dividita en du partojn – sur la sama etaĝo –, aperas en tiu ĉi alo. Eble oni povas serĉi ĉi tie la drinkan kaj podetalan lokalon.

Ne estas konfirmebla tiu supozo, ke en la „civila urbo" sur la okcidenta flanko de la strato kondukanta al la norda pordego enviciĝis drinkejoj (*caupo*).

En la amuzado de la amasoj ludis grandan rolon la publikaj banejoj; la tiuspecaj „kulturpalacoj" de la antikveco. Tiel ekz. ĉe la renkontiĝo de la du ĉefstratoj de la „civila urbo" estis konstruita publika banejo. Inter ĝiaj ruinoj troviĝis kvarangula plumba pezilo – sur ĝi estas cifero indikanta la nombron de funtoj: V – kiu montras, ke ankaŭ vendado okazis en la banejo. Estis trovitaj tie ĉi bovlopecoj; ili povas esti la postsigno, ke oni ankaŭ manĝis surloke. La faligitaj moneroj probable venis de la kuk- aŭ kolbasvendistoj, la barbiroj laborantaj tie ĉi kaj la masaĝistoj kaj pezlevantaj akro-



Dumiljara orgeno en Aquincum

batoj; perdis ilin, nature , ankaŭ la pilkludantaj gastoj, ŝtelistoj, kaptitaj ĉe la freŝa faro kaj postsekvitaj ktp.

Ĝis nun ni parolis pri la ĉiutage ripetiĝantaj sed ordinaraj amuziĝaj ebloj de la publikaj banejoj. Male, la prezentadoj de la teatroj kaj la amfiteatroj, la „rondaj teatroj", amuzis la loĝantojn de Aquincum per pli grandiozaj spektakloj.

En Pompejo, apud la teatro, estis konstruita ornamita, tegmentita ambulatorio proks. 50 x 60 m granda. Eble ankaŭ la postsigno 60 x 20 m granda apud la teatro de Aquincum estis halkonstruaĵo. Ĉiukaze, epigrafo atestas, ke ekzistis aktora (enteriga mutuala) asocio; sekve de tio, ankaŭ teatro.

Tiu paro da konstruaĵoj kun halo kaj ronda plano probable servis ankaŭ por muzikaj prezentaĵoj kaj koncertoj. Ankaŭ la legio havis sian „apartan dungosoldatan orgeniston", do, evidente, ankaŭ sian propran *orkestron.* Krome, kantistino en publikaj koncertoj prezentis kantaĵojn, kiujn ŝi akompanis per liuto aŭ orgenmuziko. En la orkestro – surbaze de antikvaj bildoj trovitaj aliloke – estas imagebla la kunlaborado de korno, fluto, fajfilo kaj ĝenerale, la plej diversaj blovinstrumentoj.

Se jam ekzistis teatro kaj orgeninstrumento en la ĉefurbo de Orient-Panonio, oni ja povas supozi, ke oni prezentis ĉiujn tiujn programerojn, kiuj kutime estis akompanataj de orgenmuziko aŭ prezentitaj sur scenejo. Tiel, oni povis vidi tie ĉi ankaŭ dancprogramerojn, pilkludojn – kaj ceterajn prestidigitistajn spektaklojn. Estas eble, ke ankaŭ en Aquincum infankoruso akompanis tiujn ĉi. Tie ĉi estis aŭditaj kaj prijuĝitaj ankaŭ kantaj kaj orgenludaj konkursoj. Eble ankaŭ en Aquincum la premiitoj de la kantaŭ orgenkonkursoj ricevis palmobranĉon, se ne el oro, el arĝento aŭ alia pli malkara metalo.

La *amfiteatraj ludoj* certe signifis la plej grandan amuziĝan eblon. Verŝajne ankaŭ ĉe la amfiteatro de la civilurba Aquincum – same kiel en Pompejo – la kvin plej malaltaj sidvicoj proksimaj al la batalteren estis rezervitaj por la eminentularo; la mezan trionon de la spektantejo eble okupis la „civitanoj" aĉetantaj biletojn aŭ disponantaj distribuitajn eniratestilojn. Povas esti, ke ankaŭ en la plej altaj vicoj la eniro estis senpaga. La virinoj ĝenerale sidis plej supre. En la militista amfiteatro tiu ĉi apartigo verŝajne ekzistis laŭ pordegoj.

Dum la elfosado de la civilurba amfiteatro de Aquincum, ja estis trovitaj plataj diskoj. Tiuj ĉi estis faritaj el kalkŝtono, potpecoj, briko, osto kaj bronzo. Iliaj diametroj varias inter 22-86 mm. Verŝajne ili estis perditaj *tesserae,* „enirĵetonoj". Kelkfoje ili estis truitaj en la mezo, eventuale estis eĉ radformaj pecoj, por ke la distribuantoj povu surstangigi ilin. Tio eble estis bezonata, ĉar estis necese kunporti centojn da ili al la loko de distribuado. Kelkaj pecoj – supozeble – servis kiel kalkulmarkoj.

Deponitaj en vicoj ĉe la rando de la batalterenо de la amfiteatra areno troviĝas hodiaŭ la ŝtonbenkoj de la plej malalta sidvico, kiuj suprenruliĝis verŝajne dum elfosado. Sur preskaŭ 20 benkoj la eminentaj posedantoj gravurigis siajn proprajn nomojn. Aperas inter ili la sidbenko de *G(aia) Valeria Nonia,* kiu, kvankam virino, okupis lokon por si en la unua vico.

Tiuj ĉi estis la persone rezervitaj sidbenkoj. Tamen, kelkfoje estis malkovritaj iuj sektoroj de la meza spektantejo – ekz. laŭ la modelo de la ĉefurbo de Okcident-Panonio – por certaj urbdistriktoj, aŭ eĉ por membroj de societoj.

Krome, enviciĝis en la areno leĝeraj, amuzaj programeroj. Sendube la orgeninstrumento kaj la orkestro, kiu okupis lokon apud la ĉefpordego malfermiĝanta al la areno, akompanis precipe tiujn ĉi. La aranĝantoj kaj eminentuloj kovris la kostojn de la ludoj kaj prezentadoj plejparte el la propra poŝo. Ĉefe tiuj ĉi agis kiel zelotoj por la sukceso de la plej multekosta programero, la gladiatora duopa batalo, ĉar ili devis pagi kiel kompenson proks. 1000 arĝentajn monerojn por mortigitaj aŭ grave vunditaj batalantoj, dum por la rolado de la gladiatoroj forirantaj en bona fizika stato, nur 20 denarojn kiel kompenson; tio estas,

Aquincum – en 1983

kiel „prunteprenan pagon" al la posedantoj de la gladiatora trejnejo. Tio, nature, unuavice rilatas al la civilurba amfiteatro, ĉar la gladiatoroj de la soldateja amfiteatro venis el la vicoj de la militkaptitoj, kies vivo estis pli malkara.

En la Muzeo de Aquincum estas videblaj *argilaj diskoj kun reliefaj* figuroj. Laŭ ĝenerala opinio ili estis muldiloj por baki flanojn. La flanoj faritaj sur ili estis rimedoj de la oficiala ŝtata „propagando": se ekz. cirkulis novaĵoj, ke denove atakas la ĝermanoj aŭ jazigoj, tiam estis distribuitaj en la spektantejo tiaj flanoj, sur kiuj la bildo propagandis, ke – jen – la imperiestro jam piedpremas la malamikon. Tamen, se malprecizaj famoj disvastiĝis, ke inter la imperiestro kaj iu sekvanto aŭ parenco refoje minacas interna milito, en tiu kazo, evidente, estis distribuitaj tiaj kukdiskoj, sur kiuj la du kontraŭuloj ĝuste premas la manon unu kun la alia.

Kelkfoje en la spektantejo povis funkcii ankaŭ deklamkonkurso. En la etoso de bonhumoro ĝi provis akiri popularajn rimedojn de la gubernatoro aŭ de la gvidantoj de la urbo per la forto de la amasa vorto. Inter la ruinoj de la civilurba amfiteatro troviĝis laĉtrediloj aŭ kudriloj tajlitaj el osto. Estas eble, ke iu spektanto perdis ilin, dum aliflanke, estas donitaĵoj koncerne ilin de alia loko, ke la amfiteatra prezentado estis ankaŭ la loko de „modprezentado". Ĉe la kaso oni povis lupreni laŭmodajn vestojn, sklav-akompananton, ktp. por la daŭro de la prezentado. La spektantoj, nature unuavice la virinoj, povis esti aspergitaj ankaŭ per perfumaĵo. Tio estis la *sparsio.*

Tradukita de Bernard *Golden*

Parlamentejo - simbolo de Budapeŝto

La Parlamentejo estas la plej karakteriza konstruaĵo de Budapeŝto. La nov-gotikan konstruaĵon planis arkitekto Imre *Steindl,* ĝi estis konstruita inter 1885–1904. La longo de la Parlamentejo estas 268 m, la larĝo 118 m, kaj la kupolo altas 96 m. La konstruaĵo estas simetria, ĝi kuŝas sur 17.745 m^2. Ĝi havas 28 ŝtuparejojn, 27 pordegojn kaj 10 internajn kortojn. Ekstere ornamas ĝin 88 statuoj de regnestroj, ŝtatviroj kaj herooj. Oni povas vidi ĉe la Danuba flanko de la Parlamentejo la statuojn de la hungaraj regantoj ekde la 7 patrujokupantaj estroj ĝis la reĝo Ferdinando la 5-a (1835–1848). Ĉe la flanko de la Kossuth-placa ĉefenirejo enviciĝas la statuoj de Transilvaniaj regnestroj, militestroj kaj konataj bravuloj.

Sur la placo, antaŭ la Parlamentejo troviĝas tri monumentoj. Dekstre estas tiu de Lajos *Kossuth,* grava ŝtatviro, la gvidanto de la hungara revolucio kaj liberbatalo en 1848/49. La alia estas la staranta figuro de Mihály *Károlyi,* kiu estis la unua prezidento de Hungario post la unua mondmilito. Maldekstre troviĝas la statuo (sur ĉevalo) de Ferenc *Rákóczi la 2-a,* kiu estis la gvidanto de la liberbatalo komence de la 18-a jarcento.

Ambaŭflanke de la ĉefenirejo estas troveblaj du ŝtonleonoj. En la 11 m larĝa ŝtuparejo estas videblaj murpentraĵoj de Károly *Lotz.* Samloke en marmora niĉo estas la busto de arkitekto Imre *Steindl.*

Suprenirinte sur la ĉefŝtuparejo, en la dua etaĝo ni trovas la kupolan halon. Ĝi estas 20 m larĝa, la kupolo estas 27 m alta kaj ĝin tenas 16 sveltaj pilastroj, super la borderaĵo staras la statuoj de grandaj figuroj de la hungara historio. En tiu ornamita salono kiu estas la plej solena ejo en la lando, oni disdonas la plej altajn ŝtatajn honorigojn, oni aranĝas landajn aŭdiencojn kaj dum Kristnasko en tiu halo estas starigata la grandega brilanta pinarbo kun donacoj por la invititaj infanoj.



Interna halo en la Parlamentejo

La Parlamentejo – de la transa bordo de Danubo

El la kupola halo oni povas iri al la enketa ĉambro, kies specialaĵo estas grandega gobelino. Irante plu, ni povas vidi, ke ambaŭ murojn de la tn. „ĉasista salono" ornamas la freskoj de Aladár *Krisch.* En la konversaciejo de la Parlamentejo, apud la plafonkonzola kolonaro estas videblaj diversaj skulptaĵoj, kiuj simbolas diversajn profesiojn.

Estas same impona la kunsida halo de la Parlamentejo, en kiu kunsidas la supera ŝtatjura korporacio de Hungario. Super la prezida podio estas la blazono de Hungara Popolrespubliko, de tiu dekstre kaj maldekstre estas du freskoj, kiuj prezentas du gravajn eventojn de la hungara historio. La unuan kunsidon de la Hungara Parlamento oni havis ĉi tie en 1896, okaze de la miljara datreveno de la patrujokupo. La konstruaĵo estis finfarita en 1904, tamen ĝi estas jam de 1902 la centro de la ŝtata vivo.

La kongresanoj havos la eblon viziti tiun ĉi imponan konstruaĵon, kiu distingiĝas ne nur kiel arkitektura majstroverko, sed ankaŭ kiel simbolo de Budapeŝto, kaj eĉ, de Hungario.

Szilárd *Bálint*

Ravaj internaj ornamaĵoj

Impona interna arkitekturo

Pegazo - tipe hungara ĉevalo

Poemkulto kaj poemkulturo en Hungario

En la pasintjara lasta numero de HV (82/6) aperis artikolo sub titolo: „Ĉevaloj, husaroj kaj aliaj...", en kiu la aŭtoro esploris kaj respondis tion, kiomgrade validas nuntempe por ni, hungaroj, la iam algluita epiteto: „rajdanta nacio". La artikolo konstatis, ke en la moderna epoko malpliiĝis la rolo de ĉevaloj, kaj paralele malkreskis ankaŭ ties kulto kaj nimbo...

Tamen, ekzistas iaspeca ĉevalo, kies vivo kaj kulto neniam malpliiĝis, eĉ konstante kreskas: temas pri Pegazo, la flugilhava ĉevalo de muzoj, simbolo de poezia talento kaj inspiro. Tiu ĉi imagita besto – ĝi devenas el la greka mitologio – nuntempe same karakterizas Hungarion, kiel antaŭe la batal- kaj sportĉevaloj.

Poemkulto – nacia tradicio

La artikolserio de István *Torda* en la numeroj de HV 79/3 – 81/2 sub titolo: „Jarcentoj de la hungara literaturo" bone prezentis al niaj legantoj la originon, disfloron de nia literaturo, kaj ankaŭ ties rolon en konstanta batalo por nacia sendependeco, libero, por socia progreso. Ne estis hazarde, ke pluraj rolantoj de tiu ĉi artikolserio aperis ankaŭ en alia, tiu de Zoltán *Halász:* „Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo."

Fakte: *Zrínyi,* la poeto estis militestro, *Petőfi,* la poeto – revoluciulo, ... sed longe ni povus daŭrigi liston de tiuj literaturistoj, kiuj plenumis samtempe historian rolon. La plej eminentaj hungaraj verkistoj ĉiam priatentis la interesojn de la popolo kaj nacio – el tio rezultas, ke por hungaraj patriotoj ĉiam estis grava la literaturo, la popolo ĉiam atendis kaj pretendis deklarojn de siaj bardoj.

Krom supre menciitaj, kaj krom la efiko de la popola poezio, la kaŭzo de la vasta interesiĝo pri poezio estas, ke la hungaraj poetoj neniam hontis verki por infanoj – tiel en la pli novaj generacioj kvazaŭ denaske, sed almenaŭ el la jaroj infanĝardenaj vivas pretendemo, soifo al belaj vortoj, kantoj, poemoj. (Modestan kolekton el hungaraj porinfanaj poemoj aperigis HEA en la jaro 1979 sub titolo *Hundbazaro* – en Esperanto.)

La fontoj de interesiĝo por la nacia poezio do estas naturaj. Sed en ĉiu epoko la plej eminentaj hungaraj poetoj kaj verkistoj konis kaj tradukis valorojn de aliaj kulturoj – ili fariĝis perantoj de mondliteraturo, malfermis niajn okulojn por la monda poezio. Dramojn de *Shakespeare* konkure tradukis hungaren: *Arany, Petőfi, Vörösmarty*; Kalevala havas eĉ tri hungarajn tradukojn, Onegin du; *Villon* jam delonge kvazaŭ estus hungara poeto; dank' al *Kosztolányi* ne estas por ni fremdaj la japanaj kaj ĉinaj versformoj...

Kompreneble, kulturaj bezonoj de diversaj socitavoloj diferencas, tiel ankaŭ interesiĝo pri poezio. Tamen ni rajtas aserti, ke poezio en Hungario ne estas afero de esoteruloj, ne estas frandaĵo por „supera dekmilo", – ĝi fakte vivas kaj floras ĉe ni, kaj la hungarlanda poemprodukto kaj importo kontentigas ĉies bezonon.

Poemoj por legi...

Laŭ eduksistemo kaj lernejaj programoj la hungaraj gelernantoj jam paralele kun la alfabeto konatiĝas kun popolkantoj, poemoj. Nomojn kaj infanpoemojn de *Petőfi, Weöres* kaj *Zelk* konas ĉiuj unuaklasanoj de elementa lernejo. Sed legolibro de la kvina klaso jam peras al ili riĉan elekton el la tutmonda popola poezio, poemojn de *Petőfi, Puškin, Rimbaud, Ezopo, La Fontaine,* ktp.

La porinfanaj kaj pioniraj, junularaj revuoj plu vastigas la kvanton de la alirebla poezio.

Krom centraj literaturaj revuoj ankaŭ tiuj de diversaj regionoj, krome semajngazetoj, tagĵurnaloj, eĉ fakaj revuoj aperigas regule poemojn.

La libroeldona agado en Hungario estas en la manoj de la ŝtato. Kvankam la profilo de la diversaj eldonejoj iom diferencas, pluraj el ili aperigas poemarojn. La eldonkvanto varias de dumil ĝis kvindekmil, eĉ pli... Nature, la plej granda interesiĝo koncernas klasikulojn: poemaroj de *Petőfi, Arany, Kosztolányi* – aperas en po 40-50 mil ekzempleroj. Similan nombron atingas klasikuloj de monda liriko, sed ankaŭ nuntempaj eksterlandaj poetoj ĝuas sufiĉe vastan popularecon.

Aparte menciindas inter la poemlibroj unu, kies apero de jaro al jaro estas evento por poezi-amantoj. Temas pri antologio *„Belaj Poemoj"*, aperanta ĉiujare okaze de la „Tago de Poezio", la 11-an de aprilo, kiu estas naskiĝtago de poeto Attila *József* (1905–1937). La iniciato estas malnova: ĝi aperis la unuan fojon kiel frandaĵo por aliĝintoj al „Rondo de Poem-amikoj", kaj ĝin ricevis senpage la aliĝintoj... Tio estis antaŭ dudek jaroj. Baldaŭ klariĝis, ke „Belaj Poemoj" interesas ne nur esoterulojn, kaj la poemaron bezonas vasta publiko. Tiel la antologio aperas ĉiujare, kaj nuntempe ĝi eliras jam en 60 000 ekzempleroj. Dufoje en la jaro, en la „Tago de Poezio" kaj dum la „Semajno de libroj" ĝi estas aĉetebla duonpreze. Tiu ĉi eldonaĵo de jaro al jaro prezentas ĉirkaŭ po 80 poetojn, entute kun ĉ. 400 poemoj.

Por aŭdi kaj vidi...

Ne mankas poezio el la programoj de la modernaj amas-komunikiloj, t.e. de radio kaj televido. Hungara Radio sur tri kanaloj disaŭdigas literaturajn, poeziajn programojn. Kelkaj titoloj de unu semajno: Poemoj de *Aragon,* sekvonttage: Literatura observado; Poemoj de *Petőfi,* Florkantoj...

Pluraj programeroj poste aperas sur diskoj: tre populara estas la diskoserio „Varietas delectat" (Varieco plezurigas), en kiu la plej eminentaj hungaraj geaktoroj prezentas la samajn poemojn en diversaj interpretoj, laŭ siaj koncepto kaj sento.

Same, en televidaj dissendoj abundas poeziaj programoj. El la ĉi-semajna programkajero: „Poemo por ĉiuj" – tiu ĉi programo aperas en la sabat-vespera ĉef-programo, kaj ĝi regule prezentas perlojn de la hungara kaj monda liriko.

Sekvonttage: „Vizito ĉe Louis Aragon"...

Budapeŝto iam estis urbo de kafejoj, kaj pluraj el tiuj famiĝis ankaŭ kiel literaturaj centroj, forumoj por poezio. (Vidu pri la temo nian artikolon en HV 82/6). Pluraj el tiuj kafejoj eĉ nuntempe daŭrigas la tradiciojn, akceptas la taskon peri beletron al la gastoj. Unu el tiuj kafejoj estas „Korona" en Budaburgo, kie krom hungarlingvajn prezentadojn oni ofte aranĝas poemvesperojn en angla, germana, rusa kaj Esperanta lingvoj.

* * * * *

Nur kelkajn faktojn ni povis surpaperigi en la limigita spaco. Tamen, eble ni sukcesis prezenti, ke Pegazo descendanta desur Olimpo – trovis lokon en Hungario, kaj ĝi vivos ĉi tie, dum oni parolos la lingvon hungaran

Nun sekvu kelkaj el belaj poemoj de la lastaj jaroj.

Márton *Fejes*

Zsuzsa Rakovszky
(1950–)

Vitreroj de la tempo

Mi forlasis ne ĉi-saman ĉambron: la antaŭtagmeza
estis objektiva, racia kaj logika,
realoza. Scenejo de familiaj
kunmanĝoj, disputoj, trohejtita enuo
aŭ klaĉoj: burĝa salono,
dekoracio de unua-lasta akto
de iu mezaspeca teatrafo.

Tra du sensŝirmilaj fenestroj
nun torentas la helo de la neĝa
vintra ĉielo, la neĝo, la luna neĝo;
inter du transmonde verdaj radiaj
oblongoj la tria, duba fantom-flako
sur la muro: la granda spegulo.
La objektoj estas pli malpezaj
sur la Terflanko sin turnanta al la Luno:
kun malstreĉitaj konturoj ili naĝas
en la densa solvafo. Post la klasikisma tago
en la stilŝanĝiĝo – eksplodinta en mia foresto –
mi devas loĝi,
en fantom-epoko, en ŝvebanta aludo.

La sama ĉambro, dek jarojn, dudek. Ĉe sensanĝaj
kondiĉoj tiel estas bone observebla,
kiujn metodojn uzas la tempo. En la glacia torento
obsedita, abrupte, el la nenio, la
malluma funkciado brilajn pasinterojn
fetas: ne bildojn, sed
la iaman manieron de travivo. Venas,
kvazaŭ el la glaciiĝintaj tavoloj de la granda spegulo,
konservite sendifekta la dek-tri-jara
malŝika, adoleska korpo: la frostvundaj piedoj
portas korkosandalojn, laŭ kiuj la aĝo
de la ŝvebanta fosafo identigeblas; en la
jam-muzeaj bluz-falbaloj aŭ nuda mi esploris,
kiom kreskis miaj mamoj, somere, antaŭtagmeze en la
malplena loĝejo, orelumante al ŝlosiltintado...

(Aŭ kiam starante flanken de sur la
elektroluma glacio de eturba glitejo
inter la obskurajn neĝmontetojn, for el la kirliĝinta nebulo,
sur kiun knarante falis la ŝlagroj de la sesdekaj jaroj
el la entuziasmaj laŭtparoliloj – suprenrigardanta mi vidis,
sur la alta pinto de la laŭta karuselo
kiel staras en sia propra lika fluidafo
la luno, la spiranta vaku-formo,
kiel abrupta, ensonĝa solvo de
turmenta problemo – ronda,
blindiga evidentafo...)

Miaj privataj epokoj: ĉiu el ili
kun apartaj modo, spirito, historio,
instancoj: la memoro
lokalizeblas laŭ specifa gusto, sentkoloro
de la opaj jaroj... Kaj poste longe
nenio: malplenon muelantaj brakoj, la susura nigra bendo
kuris mute, la maŝino fetis
pli kaj pli palajn ekzemplerojn
de unusola momento. Nun denove
la situacio eligas siajn antenojn,
ekas, refalas, ekas. La glaciiĝinta procezo
ekdegelas. La ŝlosilo – kiu scias, kio – turniĝas
en la – kiu scias, kion fermanta – seruro,
mi malfermas ĝin, ĝi malfermas min.

Tradukis: Imre Szabó

Gyula Illyés
(1902-1983)

Antikva volbo

Ĉiu ĉizita ŝtono
en la transpren-redono
de l' ŝarĝo – kvazaŭ ŝvebas,
sin reciproke levas.

Ĉi arkoj min obsedas,
kiel ili jen pretas
defendan helpon peri:
laboron por esperi.

Kortuŝe: forto kruda
fariĝis alto nuda;
flugila homa penso
strebas al dia menso.

Sin plektas kolonparo –
jam kioma centjaro?
Tiom da freŝa movo,
kaj tamen – firma povo.

Al pezo de sovaĝo
kuniĝis svelta saĝo
kaj altas tra la vento
eĉ nun ĝis firmamento.

Ĉie ruin' senluma.
La mastro jam foriris...
Li kie paŝis juna,
signo nur tie brilis.

Eniras mi, revenas.
Espero viglas-svenas.
Mi sonĝon solvi febras:
atendi kion eblas?

Tradukis: Imre Szabó

Sándor Weöres
(1913–)

Daktilo

Verkas la poeto per daktila elano.
La bakisto per baktila elano.
La fakulo per faktila elano.
La ĥorestro per taktila elano.
La ŝakmajstro per ŝaktila elano.
La diktaturo per draktila elano.
La portisto per paktila elano.
La necesejisto per kaktila elano.
La lakisto per laktila elano.
La bankisto per ĉektila elano.
La gejo per lekfila elano.
La tajloro per fraktila elano.

Tradukis: Imre Szabó

Manĝi kaj trinki hungare

Kiel proverbo diras: Propra supo brogas, fremda allogas. Kaj nun ni komprenu iom pli vaste la proverbon, temu ĝenerale pri la manĝo, kaj ni tuj povas iele-tiele klarigi la sintenon (cetere tre ĝustan) de spertaj esperantistoj: mi trapasis la limon, mi spiris el la aero, jam ĝi mem havas interesan aromon. Ho, sed kian aromon havas tiuj manĝaĵoj, supoj, rostaĵoj... kaj la vinoj – tiuj estis diaj. Ni ĉiuj tre ofte aŭdas tiaspecajn raportojn en la Esperanto-kluboj. Kaj fakte, iun ajn popolon oni povas plene ekkoni nur, se oni gustumas ankaŭ la specialajn naciajn manĝaĵojn. Nu venu, kara leganto, kaj ni manĝu-trinku kune hungare!

Sed kia estas la hungara kuirarto?

En Hungario, same kiel ĉie en la mondo, troviĝas la internaciaj manĝaĵoj, tiujn ankaŭ vi konas, do nun ni preterlasu ilin, kaj ni turnu la atenton al la specialaj hungaraj. Eble antaŭ viaj okuloj ŝvebas terure multa ruĝa papriko, kaj eĉ pli multaj grasaj viandoj, kaj en via stomako alarmas akraj spicoj. Eble malpli terurigas vin la glasoj kun ruĝa aŭ ora vino. Sed tiu ĉi bildo estas iom falsa. Tiujn trospicitajn grasajn manĝaĵojn konsumis nur malgranda parto de la hungara popolo, ĉefe nur la riĉaj kamparanoj, kaj ankaŭ ili ne ĉiutage. La vinoj estis jam pli ofte uzataj, kompreneble. Ni aldonu ankoraŭ, ke papriko – kiu tamen ne ornamas la hungaran flagon – devenas el Mez-Ameriko kaj aperas en Eŭropo nur en la 1500-aj jaroj, en Hungario ĝi disvastiĝis nur fine de la pasinta jarcento. En la mezepoko plej oftis la nefermitaj fajreroj, kiuj malebligis friti la viandojn en graso, do la rostado havis monopolon. En Hungario en la diversaj regionoj ankaŭ la manĝkulturo tre malsamis: la *palocoj* (loĝantoj de la nord-orienta landparto) en grandaj marmitoj kuiris buljonon, fabojn, pizojn kaj manĝis sekalan panon. Ili malofte uzis grason, nur lakton kaj buteron. En Transilvanio aperas rostitaj viandoj, maizopanoj, bakitaj farunaĵoj. Sed se ni iras al la najbaraj popoloj, tie ni trovas multfoje la samajn gustojn kiel ĉe ni.

Nun ni proksimiĝu al la gustoj el tri direktoj: kiuj estas la ofte uzataj materialoj kaj spicoj, kiel oni kuiras hungare, kaj fine ni rigardu kelkajn receptojn.

Materialoj kaj spicoj

Hungario estas porko-viandon manĝanta lando, sed ni trovas multfoje bovaĵojn, bovidaĵojn, ŝafaĵojn, kokidojn, anasojn, anserojn, kolombojn, fiŝojn en la menuoj. Por konsoli la vegetaranojn jen: fungoj, terpomoj, pomoj, faboj, pizoj, cidonioj, ruĝa beto, petroselo, karoto, citrono, oranĝo, ĉerizo, rozberoj, melono, nuksoj, fragoj, cepoj, ajloj, grosoj, prunoj, kukumoj, kukurboj, maronoj, framboj, rizo, tritiko, sekalo, maizo, aveno, brasiko, rapoj, napoj, papriko, tomato, papavo, salatoj, abrikoto, persiko, sed kial mi daŭrigu tiun ĉi vicon? Eble tiom jam sufiĉe pruvis, ke aras ĉe ni ankaŭ senviandaj manĝaĵoj. Sed nun ni esploru la spicojn: jen la vortaro: vakcinio, mirteto, angeliko, anizo, laŭroj, barbekuo, bazilio, junipero, pipro, satureo, mento, citrono, meliso, ilicio, fenkolo, cinamo, skorzonero, galango, zingibro, hisopo, timiano, aneto, kaporo, kardanemo, krotono, lupolo, koriandro, karvio, kurkumo, levistiko, majorano, senoprazo, sinapo, melongeno, papriko (nu, jen, tamen!), tomato, pastinako, petroselo, rabarbo, rafano, kumino, rosmareno, safrano, kartamo, salo, asperulo, pimento, kariofilo, muskato, origano, drankunkolo, kreno, cerefolio, absinto, vanilo, verbeno, celerio, salvio, ĝardenkreso – ŝajnas, ke ceterajn spicojn oni jam malofte uzas en la hungara kuirarto. Mi mencias nur, ke preskaŭ ĉiuj ĉi spicoj estas aĉeteblaj en la specialaj vendejoj „Herbária", el kiuj unu troviĝas tre proksime al la oficejo de HEA.

La metodoj

La kuirarton oni kutime disdividas je tri grupoj: profesia kuirmetio, hejma kuirado kaj eksterhejma, t.e. subĉiela kuirado. Nun ni tuj menciu, ke nur la meza en la vico estas tradicie virina okupo.

En la profesiaj metiejoj, prefere ni diru: kuiruzinoj, oni aplikas industriajn metodojn. El socia vidpunkto, tio estas la plej racia kaj ekonomia, kaj ĝi ankaŭ en Hungario ĉiam pli kaj pli disvastiĝas en la formo de fabrikaj manĝejoj kaj gastiga industrio, ni diru: restoracioj. Sed tiu ĉi mekanikigo havas tre altan prezon: la konsumanto ricevas senkarakterajn, samspecajn manĝaĵojn. Por sola frazo ni haltu ĉi tie: la gasto tamen ne devas rezigni pri la specialaj gustoj kaj varieco, ĉar parto de tiuj restoracioj inter industriaj kondiĉoj produktas famajn, nefalsigitajn hungarajn manĝaĵojn. Pri tiuj lokoj – se vi estos kongresano – povos informiĝi el aparta kolora broŝureto: „Kiel butikumi en Budapeŝto? "

Nun ni eble rigardu la subĉielan kuirarton, kiu estas tre simpla, ĉar ĝin praktikas ĉefe viroj. La karakteriziloj estas: oni uzu kiel eble plej malmultajn kuirilojn, la metodo estu la plej simpla, kiel eble plej malmulte da materialo estu uzata (viando, terpomoj, tarhono, salo, papriko, papriko, cepo), kaj ankaŭ la fajrejo estu simplega. Ni ne forgesu, ke la viroj iris por labori, kaj ili en liberaj minutoj preparis la manĝaĵon. Tiun brancon trajtas la klasikaj, rustikaj, ĉiam puraj gustoj, aromoj. Tiu ĉi teknologio preskaŭ substrekas la originalan esencon de la baza materialo: la fiŝo estas tre fiŝa, la kokido estas vere kokido, la bovaĵo estas nur bovaĵgusta, sed eĉ lardo fariĝas pli altnivela, unika lardo. La kutimaj rimedoj estas la simpla rostostango por kio pleje taŭgas avelo- aŭ kornusbranĉetoj. Tute ne taŭgas saliko aŭ akacio, ĉar tiuj estas amaraj. Cetere estas aĉeteblaj ankaŭ metalaj stangoj. Per ili oni rostas ĉefe lardon kaj kokidojn super la liberaera fajro. La fajrokradoj ne disvastiĝis, kvankam kelkloke ni povas vidi ilin. Viandotranĉaĵojn, kolbasetojn aŭ simple fiŝojn eblas prepari per ili. Ni alvenis al la kaldrono, kiu estas sur stango pendigebla super la fajro, kaj per tio ni alvenis ankaŭ al la paprikaĵoj.

Laŭ maljunaj kuirmajstroj (paŝtistoj, fiŝistoj) la manĝaĵoj, kuiritaj en kaldrono per aldono de papriko, havas tri grandajn grupojn:

– *paprikaĵo:* en graso oni metas tranĉitajn cepojn kaj lasas ilin ŝrumpi, poste la kaldrono estas prenita de super la fajro, kaj estas enmetitaj la tranĉitaj viandopecoj, malmulte da akvo kaj nur nun estas enmetita la papriko, la manĝaĵo estas kuirita ĝis plena preparĝo.

– *bruletaĵo* (oni uzas la vortojn: frikasaĵo kaj perkelto), sed la esenco de tiu maniero estas, ke oni metas nur la tranĉitajn viandopecojn en la kaserolon sen graso, akvo, kaj ĝin kirlante oni bruletigas la viandon, kiu ellasas sian propran sukon. Aparte estas preparitaj en graso la cepo paprikumita, kaj tiu estas aldonita nur antaŭ la fino de la kuirado. Tiu estas cetere tre malfacila „sporto", ĉar malspertulo facile forbruligas ĉion.

– la tria branĉo estas *ĉio, kio ne apartenas al la antaŭaj du* (tiu cetere eĉ en la hungara lingvo ne havas nomon, sed havas strikte apartigeblan teknologion). Jen la preskriboj: oni metas en la kaldronon ĉion: viandopecojn, cepojn, akvon, kaj oni kuiras ĉion ĉi super forta fajro. La salo kaj la papriko estas aldonitaj dum la bolado, parto de la papriko nur antaŭ la fino.

Ĉe ĉiuj tri branĉoj estas uzeblaj laŭplaĉe bovo-, bovido, ŝafo-, ŝafido-, porko- kaj kokido-viandoj. Eĉ anstataŭ viando oni uzas ofte terpomojn aŭ tarhonon. Aparte bela „scienco" estas kuiri fiŝojn laŭ la supraj metodoj, kiuj tamen diferencas inter si ĉe ĉiuj riveroj kaj lagoj de Hungario.

La hejma kuirarto estas virina. Kiuj estas la plej gravaj metodoj? Nu, tiuj jam ne estas tiel simplaj kiel la antaŭaj. Oni brogas, lardas, marinas, peklas la viandojn, sed ĉio ĉi estas nur la antaŭpreparo. La uzitaj bazaj metodoj estas: kuirado (boligo), stufado, fritado, rostado kaj bakado. Sed nun sekvu la diversaj manĝaĵoj kaj receptoj.

La manĝaĵoj

En Hungario kutime la unua plado estas supo, la dua estas aŭ viandaĵo aŭ densa saŭco, la tria estas iu frandaĵo, ekzemple bakaĵo, kompoto, sukeraĵo ktp.

Supoj estas tre ŝatataj kaj havas multajn specojn. Laŭ la koloro oni distingas inter blankaj kaj brunaj supoj. Blankaj estas la nedensigitaj (buljono, ostosupo), la brunaj estas la densigitaj. La simplaj brunaj supoj estas kuiritaj plejparte per fritfarunaĵo, pli malofte per farunkirlaĵo. La kremsupoj enhavas pistitajn fabojn, pizojn ktp. La kremsupoj similas al la antaŭaj, sed estas aldonita ovoflavaĵo kirlita per farunkirlaĵo. Oni notu, ke *gulaŝo estas en Hungario supo,* kaj jen ĝia recepto (por 4 personoj):

Materialoj: 50 dkg da bovaĵo, 1 kulero da graso, 1 cepa bulbo, 2 ajloj, 1 kulero da papriko (pulvoro), karvio, salo, 1-2 verdaj paprikoj aŭ ruĝaj tomatoj, 50 dkg da terpomoj. Por la pastopinĉaĵoj: 1 ovo kaj 5-6 kuleroj da faruno, akvo.

Preparo: Ni distranĉas la viandon je kuboformaj pecetoj. En varma graso ni fritas la cepotranĉaĵojn, ni aldonas paprikan pulvoron, iom da akvo, kaj ni kirlas ĝin. Poste ni enmetas la viandon, kaj – aldonante malmulte da akvo – ni stufas ĝin. Kiam ĝi jam ekmoliĝis, ni aldonas la pistitan karvion kaj ajlojn, la verdajn paprikojn kaj tomatojn, kaj akvon; ni stufas ĝin plu. Kiam la viando jam preskaŭ moliĝis, ni aldonas la tranĉitajn terpomojn kun 1,2 dl da akvo. Kiam la terpomoj estas preskaŭ molaj, ni aldonas ankaŭ la pastopinĉaĵojn. Se vi sukcesis, do bonan apetiton!

La legomaĵojn ni plejparte stufas, tiel la valoraj materialoj restas en la legomoj. Se oni tamen boligas ilin, oni uzas por verdaj fazeoloj varman akvon, por sekaj fazeoloj malvarman. Kaj jam tuj la recepto por la laŭrfolia terpomaĵo.

Materialoj: 1200 gramoj da terpomoj, 10 gramoj da graso, 2 kuleroj da faruno, 2 malgranda cepa bulbo, 2 laŭrfolioj, 1 kulero da vinagro, sukero, salo, pipro kaj 1 dl da laktokremo.

Preparo: La terpomojn ni purigas, distranĉas, ni metas ilin en la kaserolon kaj verŝas sur ĝin salan akvon tiel, ke ĝi nur kovru la terpomojn. El la graso kaj farunaĵo ni faras fritfarunaĵon, kiun ni fritas ĝis ĝi havas bulkokoloron, tiam ni enmetas la cepotranĉaĵojn, kaj ni aldonas iom el la suko de la bolantaj terpomoj. Post tio la fritfarunaĵon ni filtras sur la terpomojn. Ni aldonas laktokremon, laŭguste ni spicas ĝin per vinagro, sukero, pipro kaj ni boligas ĝin.

Kiel garnaĵon ni manĝas terpoman pureon, gratenitajn terpomojn, pistitajn terpomojn, pizon kun karotoj, brasikon, rizon, maizon, nokojn ktp.

El la salatoj la plej ŝatataj estas laktuko, tomato, verda papriko, ruĝa beto, brasiko, fungoj, cepoj, maizo, rafanoj, kukumoj, pizo.

El la saŭcoj ni rigardu unue la malvarmajn: majonezo, tartara saŭco, mustardo, pomo-, laktokremo-, oranĝo-, ova kremo-, drakunkolo- kaj apiosaŭcoj. El la varmaj: ruĝa beto, fungoj, karvio, okzalo, kukumoj, laktosaŭco kaj diversaj fruktosaŭcoj.

La fiŝaĵoj nur lastatempe estas preparataj pli vaste. Sed tiujn ni jam parte menciis.

La preparmaniero de la viandoj estas eble la plej varia. La bakotajn viandojn ni salumas, antaŭ ol meti ilin en la bakujon. La fritaĵojn parte ni fritas en graso post spicumo, alian parton ni gratenas aŭ simple nur kovras per maldika tavolo da ovo kaj faruno. Kaj ni elektu ankaŭ ĉi tie iun viandaĵon, jen la gratenita porkoviando.

Materialoj: 600 gramoj da porkoviandoj tranĉitaj, 50 gramoj da faruno, 150 gramoj da paneroj, 2 ovoj, salo, graso aŭ oleo por la fritado.

Preparo: La tranĉaĵojn ni batas, salumas, trempas ilin en farunon, ovon kaj panerojn, poste ni fritas ilin en oleo aŭ graso. Kiel garnaĵon ni povas surtabligi frititajn terpomojn.

Vinoj

Manĝi sen trinki – tio ne eblas. Kaj kion trinkas hungaroj? La respondo estas tre simpla: ĉion. Al la internacie konataj aperitivoj aldoniĝas la kutimaj hungaraj brandoj el ĉerizo kaj abrikoto.

Tamen la plej grandan tradicion havas la vinoj, ja Hungario estas fama vinprodukta lando. La plej gravaj vitejoj troviĝas en la ĉirkaŭaĵo de Eger, Tokaj, apud Balatono, ĉirkaŭ Pécs, ĉirkaŭ Sopron, nu kaj sur la Granda Ebenaĵo – finfine ja la tuta lando estas vitejo. Kiuj ŝatas la ruĝajn vinojn, tiuj serĉu *Bikavér* (Taŭrosango) kaj *Medoc* de Eger, *Kékfrankos* de Sopron kaj *Kadarka* de Mecsek. Tiuj estas molaj, iom acideskaj, acerbaj vinoj. El la blankaj vinoj eble la plej dolĉa kaj la plej fama estas la asuvino de Tokaj, la apud-Balatonaj vinoj estas iom acerbaj, la plej famaj el tiuj: rizlingo, *Badacsonyi Kéknyelű* (blufusta de Badacsony), *Szürkebarát* (griza monaĥo) ktp. Ankaŭ la ebenaĵaj vinoj estas ofte konsumataj, sed tiuj havas malpli bonan kvaliton ol la montaraj.

Nu, jes mi fakte ne povis ĉion gravan prezenti. Por sperti proprastomake Hungarion, oni devas ĝin viziti. Por ke tiu vizito estu pli alloga, nun fine mi malkaŝas, ke ŝajne ankaŭ ni hungaroj trinkas jam pli da biero ol vino. Vi povas gustumi tre multajn okcidentajn biero-specojn, do, ankaŭ la hejmaj gustoj akompanos vin al Hungario.

Imre *Szabó*

Rubriko de fakterminoj

Per tiu nova rubriko HUNGARA VIVO intencas prezenti iom da fakterminaro: bazajn esprimojn kaj terminojn de diversaj fakoj, ĉar ili ĝenerale mankas en la vortaroj. La suba simpla teksto servas sole por igi klara la sencon de la fakesprimoj, tiel evitante la foje pezajn difinojn. Ni esperas, ke tiu prezentmaniero estos sufiĉe taŭga por nia internacia legantaro; proponoj tiurilate estas bonvenaj.

MINEJO

La *min-industrio* la mineralojn, krudmaterialojn minas foje el *surfacaj minejoj,* post elkavigo de la neutiligeblaj *tegtavoloj,* tegtero. Ofte profunde, subtere situas la *kuŝejo* de ercoj, karbo, inter *supertavoloj kaj subkuŝanta rokaĵo (subtavoloj).*

Por elmini la subteran *mineralriĉaĵon,* oni profundigas el *surtera instalaĵo: ŝaktoturo* la vertikalan ŝakton, en kiu *liftokaĝo* transportas de sur la *ŝaktofundo* la ekspluatitan materialon. Disde la ŝakto oni *elkavigas per breĉado* – por ekspluati karbotavolon, ercvejnon – *galerion* (ventol-g., transport-g.)

La ministoj laboras kun (plasta) *ŝirm-kasko* kaj *kaplampo.* Per pneŭmatika *pikmartelo* kaj *martelborilo* ili fendas la karbofronton aŭ *rokfronton,* sed helpas ankaŭ *skrapĉeno* kaj segmaŝino. La *eksplodisto* el sekura loko bruligas per *meĉo la eksplod-ŝarĝaĵon,* poste la rubon prenas skrapiloj de *transportĉeno,* kiu ŝutas ĝin sur kaŭĉukan *transportbendon. La rubo* servas por plenigi *elminitan, ekspluatitan galerion,* de kie oni jam forigis sub la *galeri-plafono la subten-trabaron,* kaj la fostojn sur la *galeri-planko.*

La ercvejnoj foje dispartiĝas, ĉar iam – ekzemple dum la malfrua triaso, aŭ frua ĵuraso – *romp-ŝoviĝoj: faŭltoj* perturbis la *tavolkuŝon* en la *falt-montaro.* La karbotavolo altiĝis preter *strukturaj faŭlt-linioj* kaj formis *horston.* Aliloke la *tavolaro* sinkis, formiĝis (tektona) *malhorsto,* malaltaĵo aŭ kavaĵo. Pere de faltado kreiĝas la konkava (proksimume U-forma) *sinklinalo* kaj ĝia kontraŭo: la *antiklinalo.* En tiuj *formacioj* ofte troveblas *naftohava* tavolo, tergaso, sub *nepenetrebla tavolo.*

Surbaze de la tektonika kaj stratigrafia strukturo de la regiono, geologoj serĉadas kaj esploras *trovejojn* de feraj kaj *ne-feraj* ercoj. *Borsondaĵoj* bezonas bor-aparaton: *borturon,* poste *pumpilturo* elterigas la nafton. *Karotaĵo* helpas (per geofizika sondado) la geologian *mapadon,* ĉar detala pristudo necesas por determini la ekspluateblajn *rezervojn* antaŭ la min-konstruado. La *minprojektistoj* devas koni, ĉu la surfacon kovras dika *sablaro* (sablo-tavoloj), aŭ *tavoligita* sabloŝtono, kiu *fragmentiĝas* aŭ diseriĝas; ĉu la *elkavigilo* kavos en *argileca rokaĵo* aŭ tra *algaj kalkoŝtonoj* kun fendaĵoj ekz. N-orientaj; same, ke por sendanĝerigi la minadon, pumpiloj devos forigi *minej-akvon.*

Ervin *Fenyvesi*

Gustumu la hungaran!

(Daŭrigo)

19. l (l) kiel en E-o.
láb (la:b) ‚piedo(j)'
bal (bɔl) ‚maldekstra'
bal láb (bɔlla:b) ‚maldekstra piedo'
áll (a:l) I ‚mentono'
áll (a:l) II. ‚/li/ŝi/ĝi/ staras'
ki áll? (*ki* a:l) ‚kiu staras?'
a baba áll (a bɔbɔ a:l) ‚la pupo/bebo staras'
dél (de:l) ‚tagmezo, sudo'
déli (de:li) ‚tagmeza, suda'
éjjel (*e:*jjel) 1. ‚nokto'; 2. ‚nokte'
fél (fe:l) I. ‚duono'
fél (fe:l) II. ‚/li/ŝi/ĝi/ timas'
fél egy (fe:l ed'd') ‚duono antaŭ la unua'
félek (*fe:*lek) ‚mi timas'
liba (*li:*bɔ) ‚ansero'
hal (hɔl) ‚fiŝo'
hall (hɔll) ‚/li/ŝi/ĝi/ aŭdas'

20. ly (j) kiel *j* en E-o.
Originale la litero **ly** signis molan *l* (l'), sed en la hodiaŭa literatura lingvo kaj en la granda plimulto de la dialektoj tia sono jam ne ekzistas: ĝi fariĝis ĝenerale (j), en kelkaj dialektoj (l). (Nur en tre malgranda parto de la lingvoteritorio restis (l').
kályha (*ka:*jhɔ) ‚forno'
kályhába (*ka:*jha:bɔ) ‚en fornon'
hely (hej) ‚loko'
helye (*he*je) ‚lia/ŝia/ĝia loko'
a kályha helye (a *ka:*jhɔ *he*je) ‚la loko de la forno'

21. m (m) kiel en E-o.
ma (mɔ) ‚hodiaŭ'
mai (mɔi) ‚hodiaŭa' /ne forgesu, ke i estas ĉiam (i), kiel en E-o, sekve *mai* konsistas el du silaboj: (ma-i)
mi (mi) ‚ni'
mi? (mi) II. ‚kio?' (singularo)
mik? (mik) ‚kio?) /pluralo/
mi ég? (*mi* e:g) ‚kio brulas?'
megy (med') ‚/li/ŝi/ĝi/ iras'
megyek (med'ek) ‚mi iras'
elmegy (*el*med') ‚/li/ŝi/ĝi/ foriras'
elmegyek (*el*med'ek) ‚mi foriras'

22. n (n) kiel en E-o.
én (e:n) ‚mi'
Kálmán (*ka:*lma:n) ‚virnomo Kolomano (ankaŭ familinomo)
nagy (nɔd') ‚granda'
fán (fa:n) ‚sur arbo'
a nagy fán ‚sur la granda arbo'
csend (ĉend) ‚silento'
csendben (ĉendben) ‚en silento, silente'
menni (*me*nni) ‚iri'
mennek (*me*nnek) ‚/ili/ iras'
adni (ɔdni) ‚doni'
adnak (ɔdnɔk) ‚/ili/ donas'
négy (ne'd') ‚kvar'
kilenc (*ki*lenc) ‚naŭ'
negyed (*ne*d'ed) ‚kvarono'
negyed kilenc (*ne*d'ed *ki*lenc) ‚kvarono post la oka'

23. ny (n'). Mola /palatala/*n* /*n* + *j* prononcataj kune/, kiel – laŭ kutima prononco – E-aj *nj* en si*nj*oro, pa*nj*o, o*nj*o /sed mallonga/, kaj kiel rusa mola *n* en *n*et, *N*ina, Ta*nj*a, angla *n* en *n*ew (laŭ la brita prononco), franca, itala *gn*, hispana *ñ*, portugala, vjetnama *nh*, ĉeĥa, slovaka *ň*, serbo-kroata albana *nj*, pola *ń*.
nyak (n'ɔk) ‚kolo'
anya (ɔn'ɔ) ‚patrino'
anyja (ɔn'n'ɔ) ‚lia/ŝia/ patrino'
lány (la:n') ‚knabino'
lánya (*la:*n'ɔ) ‚lia/ŝia filino'
hány? (ha:n') ‚kiom /da/?'
hány lány? (*ha:*n la:n) ‚kiom da knabinoj?'
nyolc (n'olc) ‚ok'
nyolc lány ‚ok knabinoj'
lányok (*la:*n'ok) ‚knabinoj'

24. o (o). Mallonga *o*, kiel en E-a m*o*ndo.
csokoládé (ĉo*ko*la:de:) ‚ĉokolado'
dob (dob) I. ‚tamburo'
dob (dob) II. ‚/li/ŝi/ĝi/ ĵetas'
fog (fog) I ‚dento'
fog (fog) II. ‚/li/ŝi/ prenas'
hol? (hol) ‚kie?'
hol a cica? ‚kie estas la katido?'
olyan (*o*jɔn) ‚tia'
jobb (jobb) I. ‚pli bona'
jobb (jobb) II. ‚dekstra'
jobb láb (*jo*bbla:b) ‚dekstra piedo'

25. ó (o:). Longa *o*, kiel en E-a b*o*na.
j:o (jo:) ‚bona'
a baba jo: ‚la bebo estas bona'
l:o (lo:) ‚ĉevalo'
j:o l:o (*jo:* lo:) ‚bona ĉevalo'
olló (*o*llo:) ‚tondilo'.

26. ö (ö). Mallonga labiala (artikulata ankaŭ per la lipoj) vokalo inter *o* kaj *e*, kiel franca, nederlanda *eu* (sed mallonga), germana, finna, sevda, turka *ö*.
jön (jön) ‚/li/ŝi/ĝi/ venas'
jönnek (*jö*nnek) ‚/ili/ venas'
ön (en letero:) Ön (ön) ‚vi, Vi' (ĝentila alparolo singulara)
önök, Önök (*ö*nök) ‚vi' (ĝentila parolo plurala)
ön jön ‚vi venas' (sing.)
önök jönnek ‚vi venas' (plur.)
hölgy (höld') ‚sinjorino, damo'.

27. ő (ö:). Simila al **ö** (ö), sed longa /en la finna skribata per *öö*/.
ő (ö:) ‚li/ŝi/ /uzata nur emfaze; ekzemple ‚li/ŝi venas/ sonas hungare simple *jön*. Sed ‚*li* venas' aŭ ‚*ŝi* venas', kun emfaza *li* aŭ *ŝi* sonas hungare *ő jön* (*ö* jön)./
nő (nö:) I. ‚virino'
nő (nö:) II. ‚/li/ŝi/ĝi/ kreskas'
nőnek (*nö:*nek) I. ‚al/por virino'
nőnek (*nö:*nek) II. ‚/ili/ kreskas'
kő (kö:) ‚ŝtono'

28. p (p) kiel en E-o.
apa (ɔpɔ) ‚patro'
apja (ɔpja) ‚lia/ŝia patro'
Pál (pa:l) ‚Paŭlo'
Pál apja (*pa:*l ɔpjɔ) ‚la patro de Paŭlo'
pad (pɔd) ‚benko'
a padon (o pɔdon) ‚sur la benko'
nap (nɔp) 1. ‚suno' 2. ‚tago'
nappal (nɔppɔl) ‚tage'; ‚tago' (ne nokto)
pap (pɔp) ‚pastro'
papa (pɔpɔ) ‚paĉjo'
pápa (*pa:*pɔ) ‚papo'
Pál pápa (*pa:*l pa:pɔ) ‚papo Paŭlo'
pipa (*pi*pɔ) ‚pipo'
pék (pe:k) ‚bakisto'
cipő (*ci*pö:) ‚ŝuo(j)'.

(Daŭrigota)

I. *Botos*

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

8. SENNACIISMO SENMASKE

Antaŭ la unua mondmilito la laborista movado estis preskaŭ identa kun la socialdemokrata movado. Ĉiuj aliaj tendencoj – ekz. la anarkiismo – estis nur akcesoraj, minoritataj tendencoj. La reganta ideologio de la socialdemokrata movado estis la marksismo, kvankam de la jarcentŝanĝo rapide disvastiĝis ankaŭ nemarksistaj ideologiaj konceptoj. *La oficiala, deklarita, baza principo de la movado restis la proleta internaciismo.* Tamen, ankaŭ tiurilate ŝanĝiĝis la situacio depost la jarcentŝanĝo: la iom-post-ioma elimino de la marksismo preparis la grundon por la naciismo, por la socialŝovinismo. Ĉio ĉi – malgraŭ la deklaroj – kondukis al la *perfido de multaj socialdemokrataj ĉefoj* en 1914: ili fariĝis propagandistoj de la imperiisma milito.

De 1918 multaj laboristoj aliĝis al la rapide vastiĝanta komunista movado, kiu restis fidela al la ideo de internaciismo. Eĉ la pli malfrue restariĝanta socialdemokrata movado klopodis ekskomuniki la iamajn perfidulojn kaj revalorigi la noblan ideon de la internaciismo.

Tamen kelkaj, precipe en anarkiismaj rondoj, venis al la falsa konkludo, ke internaciismo rekte kondukas al naciismo, socialŝovinismo, eĉ al milito. Ankaŭ kelkaj laboristaj esperantistoj inklinis al tiu rezonado, kaj el tiuj trovis siajn adeptojn la teorio de *sennaciismo,* lanĉita de Eugen Adam, kiu fariĝis konata en la Esperanto-movado nur pseŭdonime: *Lanti.*

Tiu *Eugen Adam* (1879–1947) estis franca meblisto, poste meblodesegnisto, kiu konatiĝis kun Esperanto dum sia militservo. Antaŭ la milito li estis anarkiisto, en 1920 li aliĝis al la Franca Komunista Partio, kiun li forlasis post ok jaroj. En la jaroj 1921–1933 li estis la estro de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), en 1936 li forlasis Eŭropon kaj mortis en Meksikio.

La imperiisma milito ankaŭ en li vekis ardan malamon kontraŭ ĉiu naciismo. Spronate de tiu malamo en la jaroj 1920–1930 li iom post iom eksplikis sian teorion pri la sennaciismo en multaj artikoloj kaj broŝuroj.

Kontraŭ-esperanta Esperanto-movado?

Laŭ Lanti naciismo estas memstara forto, sendependa de la ekonomiaj kaj aliaj faktoroj, kaj kiel tia, ĝi estas la kaŭzo de ĉiu malbono. Kaj la ĉefa kaŭzo de la naciismo estas mem la nacia dividiĝo de la homaro, kiun dividiĝon oni devas ĉesigi, por ke ĉesu ankaŭ la naciismo. La kerno de tiu teorio estas la lingva problemo: *la naciajn lingvojn oni devas elimini, aboli,* kaj anstataŭ ili *oni devas enkonduki Universalan Lingvon,* por kiu rolo jam pretas Esperanto. Do, la tasko de la sennaciista movado estas iniciati la universaligon, ekskluzivigon de Esperanto, prepari la elpuŝon de la naciaj lingvoj. Laŭ la devizo de Lanti la movadanoj „kutimiĝu al eksternacia sentpens- kaj agadkapablo", tiel kreiĝos la *„sennacieca popolo".*

Lanti, do, estis nur pala posteulo de la grandaj utopiistoj, kiuj priskribis ne nur la lingvan unuecon de la homaro, sed prilaboris la sistemon de tute perfekta homa socio.

Esperanto-movado ĝis elpaŝo de la sennaciistoj estis internacilingva movado: ĝi akceptis la lingvan diversecon

Eugèn Adam (Lanti) (1879-1947)



de la homaro kia ĝi estas, ĝi ne celis elimini la naciajn lingvojn. *La sennaciismo malakceptis la teorion de la Internacia Lingvo,* ĝia programo enhavis la universaligon de Esperanto. Tiurilate ĝi fundamente diferencis de ĉiuj aliaj tendencoj de la Esperanto-movado, ĝi dekomence estis fremda korpo en la internacilingva movado. La sennaciistoj post iom da tempo neeviteble apartiĝis, disiĝis de la aliaj tendencoj kaj organizaĵoj de la movado, eĉ interbatalis kontraŭ la aliaj.

La sennaciismo sendube estis kontraŭnaciisma teorio, sed samtempe ankaŭ *kontraŭnacia teorio* ĝi estis. Ĝi ne estis akceptebla por la naciistoj, sed ne estis akceptebla ankaŭ por la patriotoj, ŝatantoj de la nacioj, ĝi estis ankaŭ *kontraŭ-internaciisma,* kaj kiel tia ĝi devis kontraŭiĝi al ĉiuj aliaj tendencoj de la laborista movado, deklarite internaciismaj.

Sennaciismo atakis ne nur la teorian fundamenton, la tradician celkoncepton de la Esperanto-movado, sed efike konfuzis la jam pli-malpli elformiĝintan publikan opinion pri ĝi. La sennaciistoj forte kontribuis al tio, ke ekstermovadaj medioj eĉ hodiaŭ atribuas al la Esperanto-movado universallingvajn klopodojn. Eĉ Lanti mem prenas ekzemplojn jam el 1927, ke „ekz. Krupskaja, la vidvino de Lenin, antaŭ nelonge faris paroladon pri nacia internacia kulturo, kaj en tiu parolado

E. LANTI

NACIISMO

STUDO

PRI

Deveno, Evoluado kaj Sekvoj

19 30

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
ELDONA FAKO KOOPERATIVA LEIPZIG
EL LA KOLEKTO DE
FAJSZI KÁROLY
GYŰJTEMÉNYÉBŐL
BUDAPEST

ŝi atakis sennaciismon, pledante por nacikulturoj. Estas rimarkinde, ke ŝi ligis sennaciismon kun Esperanto kaj direktis ŝiajn atakojn samtempe kontraŭ tiu kaj alia." Samloke li mencias, ke pro nura aludo je elimino de naciaj lingvoj en la estonto, la radiokurso de Esperanto en la Ĥarkova radio estis tuj ĉesigita.

Pro tiaj damaĝoj ni asertas, ke el tiu aspekto la *sennaciismo estis movado kontraŭ la internacilingva movado, kontraŭ la Esperanto-movado,* eĉ se ekzistas pluraj aspektoj de la problemo.

Sennacieca Asocio Tutmonda

La eĉ hodiaŭ ekzistanta SAT fondiĝis en Prago 1921–08–03. La fondkunvenon ĉeestis 79 partoprenantoj de la 13. Universala Kongreso. SAT havis individuan membraron, kiu rapide kreskis de 1064 en 1922 al 7000 en 1931, la lasta jaro antaŭ ĝia skismo. *Nuraj du landoj donis pli ol duonon de la membraro:* Sovetio 33 procentoj kaj Germanio 22 procentoj. Sed en la 1930-aj jaroj, post la eksiĝo de la komunistoj kaj socialdemokratoj ĝuste en tiuj du landoj apenaŭ restis SAT-membraro.

SAT dum sia unua jardeko estis unueca organizaĵo de la laboristaj esperantistoj, sendepende de iliaj politikaj apartenoj. Ĝia oficiala organo estis *Sennacieca Revuo* (1921–1924 Parizo), poste *Sennaciulo* (1924–1933, Leipzigo, 1933–1940 Parizo). En Leipzigo ĝi aperis semajngazeto, dum sep jaroj, sub la redakto de la germana (tiam komunisto) Norbert Barthelmess. Ĝi estis unu el la plej bone redaktitaj gazetoj Esperantaj.

La gvidantaro de SAT fakte estis Pariza grupo de sennaciistoj, kiu klopodis influi pli kaj pli la membraron, varbi novajn adeptojn sub la flagon de la sennaciismo. La batalo de la politikaj frakcioj finfine kondukis al organiza disiĝo. Tamen estas interesa demando, kial la aliaj esperantistoj povis kunlabori almenaŭ dum jardeko kun la sennaciistoj? Kial sennaciismo influis, almenaŭ parte, 7000 eminentajn esperantistojn, kiuj, cetere, plejparte estis landaj aŭ lokaj gvidantoj de la landaj laboristaj esperantistaj organizaĵoj?

Prestiĝo de la sennaciistoj

El inter la multaj faktoroj, kiuj koherigis sennaciistojn kun la aliaj laboristaj esperantistoj, ni prezentas nur unu: ilian *lingvan aŭtoritatecon.* Ili klopodis uzi Esperanton ĉiam, ne nur en siaj internaciaj rilatoj, sed ankaŭ inter si, multaj eĉ en la hejma, familia vivo. La konsekvencaj sennaciistoj konstante vivis, pensadis en la lingvo, majstris ĝin. Sennaciistaj laboristoj ofte multe pli regis la lingvon ol eminentaj aktivuloj de la neŭtralaj asocioj.

Lanti mem iĝis fama stilisto, per siaj tradukoj li akiris literaturistajn laŭrojn. Li iniciatis la eldonon de *Plena Vortaro de Esperanto,* kaj en la 1930-aj jaroj ĝi jam estis la norma vortaro de Esperanto. Ĝiaj novaj eldonoj ĝis hodiaŭ estas tiuj de SAT.

En la movado, kie la lingvoscio, la bela, preciza parolo kaj la bona stilo estas virtoj, la reputacio de la sennaciistoj estis granda. Tiu reputacio, kvankam nur lingva, altiris ne nur laboristajn esperantistojn, sed eĉ homojn, el ekster la laborista movado.

Tiuj kaj aliaj kialoj de la relativa populareco de la sennaciismo ne povas kaŝi la fakton: *la sennaciista movado estiĝis kaj restis unike stranga, paradoksa fenomeno, movado kontraŭ la Internacia Lingvo.* Sennaciismo estas kontraŭ la teorio de Komenský kaj Zamenhof, ĝi estas teorio kontraŭ internaciismo.

Sennaciismaj eldonaĵoj

Idealoj kaj epokoj

Mi devus, eĉ mi ŝatus skribi pri kelkaj libroj, ricevitaj de mia bulgara amiko, Nikola Aleksiev, sed la tasko, kiun mi entreprenis volonte, nun, post la legado, ne estas simpla. Kial?

Tial, ĉar anstataŭ tradicia recenzo, ŝajnas al mi pli ĝuste kaj inde skribi pri idealoj, historiaj figuroj, kiuj leviĝas antaŭ ni en ĉi tiuj verkoj. Sed ĉu paroli pri neĉiutagaj, iome-duone legendaj figuroj en nia epoko, en kiu delonge idealoj estas nemodaj? Ĉu ne estas riske, ĉar eble kelkaj el niaj legantoj ridetos je mi? Ĉu eble mi devas kredi, ke la tempoj de idealoj definitive forpasis?

Ne, Kara Leganto, mi ne timas proponi, ke ne kredu al ĉi tiu kaj al similaj sugestoj, ĉar ili estas falsaj, mensogaj. Ni ne kredu ĉiam je „moderna" Modo, ja ni povas esti konvinkitaj, ke ankaŭ en nia mempereiga epoko necesas noblaj idealoj, en nia duonfreneza 20-a jarcento estas nemalhaveblaj historiaj granduloj, kiuj ludis gravajn rolojn en la sorto de iu popolo, montris ekzemplojn, modelojn de la inda homa vivo.

Do laŭ la ok libroj mi provas fari mallongan skizon pri kvar ideal-figuroj indaj je nia distingita atendo.

* * *

Vasil Levski estas la unua heroo, kiun ni povas koni en la libro de Mercia MacDermott: Apostolo de Libereco. Jam ankaŭ la naskiĝo de ĉi tiu laboro estas tre interesa. La aŭtoro estas anglino, doktorino pri historiaj sciencoj. „Kiel studentino, kune kun kvindeko da siaj gekolegoj, ŝi partoprenis en 1948 internacian studentan laborbrigadon en Bulgario, kiu laboris ĉe la konstruado de granda baraĵlago, nomita «Georgo Dimitrov». Reveninte hejmen ŝi multe legis pri Bulgario en la Londona Brita Muzeo. Kaj ŝi decidis direkti siajn estontajn sciencajn esplorojn al la historio de Bulgario – de la Mezepoko ĝis niaj tagoj. Ŝi vizitis kun scienca celo kelkfoje Bulgarion, loĝis sufiĉe longe inter bulgaroj, ellernis tre bone la bulgaran lingvon, studis arkivojn, historian verkaron..." Kaj komencis aperi ŝiaj libroj: „Historio de Bulgario de 1393 ĝis 1885", Londono 1962; „Apostolo de Libereco", Londono 1967; „Libero aŭ morto Biografio de Goce Delĉev" (fama makedona revoluciulo), Londono, 1979. La libro pri Vasil Levski aperis bulgarlingve, kaj poste en la traduko de N. Aleksiev esperantlingve, ĉe Sofia Press.

Vasil Levski naskiĝis en 1837, lia deveno estis simila al aliaj samaĝuloj, sed lia lernado, preparĝado al iu meritplena vivo, kaj poste lia lukto, oferema batalo por la libereco de la tre ŝatata Bulgario estiĝis legenda jam dum lia vivo. Li estis kiel junulo diakono, sed kiam li maturiĝis, maturiĝis ankaŭ lia decido: forlasi ĉion por la Granda Afero, patrinon kaj gefratojn, amikojn kaj naskurbeton, sendanĝeran monaĥejon, eklezian karieron. Li fariĝis ano de la unua Bulgara Legio en Belgrado, li aliĝis al taĉmento, kaj el Rumanio li revenis en Bulgarion, kaj dum dekkvin jaroj li estis ĉeforganizanto de batalo kontraŭ la kvincentjara turkreĝimo. En tiuj jaroj montriĝis la multflankeco de liaj karaktero kaj talento, certiĝis, ke liaj scio, inteligenteco, kuraĝo kaj aŭdaco estis nekutime elstaraj. Li komencis organizi konspire komitatojn en urboj kaj vilaĝoj, do li devis iradi, veturadi tra la subpremita lando, multfoje devis batali per armiloj kontraŭ turkaj policanoj, soldatoj, tial li kaŭzis vundojn kaj mortojn, ankaŭ li mem ricevis vundojn sed tamen oni ne sukcesis kapti lin. Li uzis diversajn pseŭdovestojn, kiel granda aktoro, ŝanĝiĝadis metion, profesion, se tion deziris la situacio. Nur tri jarojn antaŭ la liberiĝo oni sukcesis aresti lin. La turka tribunalo kondamnis lin, la sultano en Konstantinopolo ne pardonis, kaj oni pendigis Vasil Levski-n en 1873. Lia tombo estas nekonata, sed lia martirmorto, lia grandeco restos ĉiam ekzemplodonaj, kaj ne nur por bulgaroj.

Probable internacie estas la plej konata filo de Bulgario *Georgo Dimitrov,* kies centenarion oni festis pasintjare ne nur en lia patrolando, sed en multaj partoj de la terglobo. Lia figuro tiam konatiĝis en Eŭropo, kiam transprenis la potencon en Germanio Hitler kaj liaj faŝistaj taĉmentoj. Por povi komenci leĝan atakon kontraŭ komunistoj, socialdemokratoj kaj ĉiuj progresemaj homoj, ili bruligis la parlamentejon en Berlino. Kaj poste ili serĉis kaj tuj trovis „ĉefkrimulon". Laŭ ilia akuzo tiu estis Georgo Dimitrov, tiam jam reputacia organizanto, komunista gvidanto. La grandaj scenoj antaŭ la faŝistaj juĝistoj en Leipzigo dum 1933 fariĝis mondfamaj kaj mondskalaj. Dimitrov donis neforgeseblan lecionon kiel oni devas kaj povas konduti kaj batali eĉ ankaŭ sub la ombro de la morto. Oni verkis pri li en la pasintaj jardekoj centojn da libroj.

La nomon de *Trifon Ĥristovski* oni ne aŭdis ekster Bulgario, ĉar li ne estis historia grandulo – nur heroo de homa vivo. Sed kiu kuraĝus aserti, ke por ĉi tiu faro ne necesas heroismo? El la kvara (kaj lasta) libro de Ĥristovski: „Mia vivo" ni konatiĝas nur kun sola vivo, sed kia sorto ĝi estis! Ĥristovski naskiĝis en 1905, kiel filo de malriĉa kampulo, kaj apenaŭ li estis sesmonata, li paraliziĝis. Kripliĝinte li neniam kapablis iri, nur moviĝi tre modere, malrapide, helpe de sia maldekstra brako. Pro tio, kaj ĉar lia familio estis malriĉa, li devis pasigi ĉiujn vintrojn hejme, en fumoplena neaerumata ĉambreto. Li ne povis viziti lernejon kaj poste labori, kiel liaj samsortanoj, tamen li lernis skribi, legi, eĉ iom post iom priverki siajn pensojn, memorojn, travivaĵojn. Laŭ konsilo de iu instruisto, li memstare ellernis ankaŭ la lingvon Esperanto, kaj ĝi estis por li grava fonto kaj helpo. Lia tuta vivo estis seninterrompa lukto kontraŭ malsanoj, kripliĝita korpo, krudaj cirkonstancoj. Tamen li verkis multajn artikolojn kaj kvar librojn. La kvaran li verkis jam je la forta instigado de lia amiko, Nikola Aleksiev, dum la lastaj monatoj de la vivo: li forpasis en majo de 1944. La manuskripton oni gardis dum la milito, kaj ĝis nun ĝi aperis bulgarlingve kvarfoje, en 1981 esperantlingve, laŭ traduko de N. Aleksiev.

Kaj la kvara ideal-figuro, menciita en la enkondukaj linioj? Li estas la tradukisto aŭ aŭtoro de menciitaj libroj, mem *Nikola Aleksiev.* Ankaŭ li luktis kontraŭ la bulgara faŝismo inter la du mondmilitoj kiel unu el kunlaborantoj de Dimitrov, konatiĝis kun la tiamaj arestejoj, kaj post la liberiĝo de Bulgario li estis gvidanto de sindikatoj, dum jardekoj estis li estro de Bulgara Esperanto-Asocio kaj la Mondpaca Esperanto-Movado, redaktoro de ĵurnaloj kaj tradukisto, aŭtoro de broŝuroj, libroj. Ankaŭ lia vivo estis kaj estas nun, post sepdek jaroj – modelo. Ankaŭ lia vivo meritus apartan portreton, volumon, sed feliĉe, li laboras senlace inter ni, kaj liaj nomo, ekzemplo estas vaste konataj en nia movado.

Mihály *Gergely*

Gyula Juhász (1883-1937)

Du aprilaj datoj: la 4-a en la jaro 1883, kaj la 6-a en 1937 limas la vivon de la poeto, kiu estis unu el la plej simpatiaj figuroj de la hungara liriko dum la dudeka jarcento. „Se ni devus listigi la dek plej grandajn kaj plej verajn poetojn, lia nomo estas inter la unuaj" – skribis pri li la poeto-amiko Dezső *Kosztolányi.*

Naskiĝinta antaŭ cent jaroj en Szeged, ankaŭ tie li finis mezlernejon. Kiel junulo kun malforta korpo kaj sentema nervsistemo li komencis verki sub influo de pluraj antaŭuloj-poetoj, poste la granda samepokano, Endre *Ady* donas al li inspirojn; kiel spiritaj idealoj *Nietzsche, Ibsen, Tolstoj* determinis lian direndon.

Li komencis studi en edukejo de monaĥoj, sed la spertoj tie akiritaj kaj ne akordigeblaj kun poeta vivo ŝanĝas lian decidon. Li ekstudis en la filologia fakultato de la Budapeŝta Universitato. Pluraj liaj samkursanoj poste akiris gvidan lokon en literatura kaj scienca vivo, ankaŭ al li oni aŭguris futuron brilan. Tamen post fino de la studado li ricevas postenon nur en provincaj mezlernejoj. En la Transilvania urbo Nagyvárad (nun Oradea en Rumanio), li komencas labori kiel ĵurnalisto, kaj kiel teatra recenzisto li konatiĝas kun aktorino de meza talento – Anna –, al kiu dankeblas lia determina senespera amo – kaj sepdeko da plej belaj ampoemoj de la dudeka jarcento.

Post pluraj suicidaj provoj venas la militaj kaj revoluciaj jaroj. La iam pasiva profesoro baldaŭ aktiviĝas, kiel ĵurnalisto li fariĝas adepto de radikalismo, simpatianto kun socialismo. Dum la Konsilia Respubliko en 1919 li fariĝas teatra direktoro; kaj ankaŭ en la sekvaj jaroj de blanka teroro li restis fidela al sia kredo: li agas kaj verkas en la intereso de la popolo laborista. Pluraj atakoj lin trafas, kiuj kontribuas al la fakto, ke lia melankolio iĝas ĉiam pli profunda depresio.

Kiel poeto en tri sinsekvaj jaroj li ricevas la tiutempan plej altan literaturan premion, kiu krom morala rekono ankaŭ finance helpas lin, sed la sukceso lin kvazaŭ paralizas. Printempe de jaro 1937 li mortigas sin per veneno.

Pluraj poemaroj aperis de li dum lia vivo, tamen el tiuj ne konstateblas la evolulinio de lia poezio, ĉar tiuj enhavas nur malgrandan parton de lia verkaro. El tio nutris sin disvastiĝinta opinio, ke lia poezio neniam ŝanĝiĝis, ke li estis komparita al muzikisto, vibriganta ĉiam la samajn kordojn.

Ankaŭ *Hungara Antologio,* aperinta antaŭ kvindek jaroj, prezentas lin nur kiel poeton de unusola kordo:

„Pasiva animo, per sia pasiveco li fermas sin kontraŭ la ĉirkaŭanta mondo, rifuĝas en la solecon kaj senĉese suferas pro sia soleco..."

Intertempe sur la paĝoj de nia revuo aperis pluraj tradukoj el liaj poemoj, ankaŭ nia nuna elekto celas prezenti la ĝis nun nekonatan flankon de la poeto.

Márton *Fejes*

Nova konfeso

Kun tuta amo, kiu en mi ardis,
kiel gehena flamo, fajr' ĉiela,
kiu en memo forajn lumojn ŝaltis
kaj brilis kiel lumotur' surtera,
kun tuta amo al vi, laboranta
popolo trista – mi vin plene amas,
vi estas por mi esper-turo granda,
kiu ĉielen el profund' elanas.
Pli varme ol ĉiu somera ardo
vin kisas kanto, kisas mi, la bardo,
estas vi sola, lasta mia amo,
vi estas por mi patrin' kaj infano!

Malamo tuta, kiu en mi ardis,
– sovaĝ' junula kaj fiero plena –
kiu tre forte iam min ekzaltis,
kiel drinkulon alkohol' venena,
malamo tuta trafu nun vin plage,
kiuj futuron, la liberan timas,
kiuj sin lulas en bonstat' senage,
kiuj la solan kredon ne estimas:
ke sanktas viv' kaj sanktas la homaro
futur-kreanta, kiel kreas maro
koralojn; kiu de ombroj al la helo
aspire venkos baldaŭ sur la tero!

Tradukis: Márton Fejes

Infantombejo

En ora suno trans la verda krad'
sur la kumuloj centkoloraj floroj,
heroldas not' sur ĉiu nomo-lad':
la vivo jen tri jaroj, jen ses horoj.

Ĉi tie dormas etsanktuloj nur –
infanĝardeno flora kaj kvieta,
sub roza blanko kaj lilia pur'
estas la morto juna kaj rideta.

Surflugas la kumulojn kolombar',
la kradoj kun invito nin salutas,
kaj ombre de la plorsaliko-par'
jen du infanoj kun feliĉ' kaŝludas.

Tradukis: Imre Szabó



Interna halo en la Kongresejo de la 68-a UK

PANORAMO

Madách-ekspozicio

Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Imre Madách, aŭtoro de „La tragedio de l' homo", kaj antaŭ 100 jaroj estis la teatra premiero de la granda drama poemo.

„La tragedio de l' homo" ĝis nun aperis en 18 lingvoj, kaj ĝi aperis sur la scenejoj de multaj landoj. Por servi la pluan popularigon de tiu ĉi elstara peco de la hungara dramverkado, la Literatura Muzeo „Petőfi" kompilis ekspozicion, kiu prezentas ĉefe la scenejan karieron de la verko. Post la Budapeŝta debuto oni povos vidi la ekspozicion en Moskvo, Weimar, Berlino, Prago, Varsovio kaj Sofio.


NEMZETI

Péntek, 1934 január 19-én

Az ember tragédiája

Teatra afiŝo de „La tragedio de l' homo"

Bankoj en Budapeŝto

Kvin eksterlandaj bankoj havas en Budapeŝto oficejojn: la franca *Banque National de Paris,* la itala *Banco di Sicilia,* la aŭstra *Creditanstalt–Bankverein,* la usona *National City Bank of Minneapolis* kaj la jugoslava *Ljubljanska Banka.* Tiuj ĉi oficejoj ne plenumas ordinaran bankan laboron, sed kolektas informojn pri la hungara ekonomio, serĉas la eblojn, kiel sia banko povus partopreni en la financado de la hungara importo.



Imre Madách (1823-1864)

Ekstera komenco dum 1982

Dum la jaro 1982 la hungara ekstera komerco atingis ŝatindan rezulton: pozitivan saldon de 517 milionoj da dolaroj. (Dum 1981 la pozitiva saldo estis 40 milionoj da dolaroj.) Tiu pozitiva saldo estis nepre necesa por bonorda repago de la eksterlandaj ŝuldoj, kaj pro tio dum la jaro estis enkondukitaj certaj limigoj de importo. Dum la jaro 1982 la hungara eksporto kreskis je 9 procentoj, la importo malkreskis je 2 procentoj. Estas notinde, ke la supra pozitiva saldo kreiĝis en la eksporto-importo kalkulita per dolaroj. En la ekstera komerco, kalkulita per rubloj, Hungario havis negativan saldon preskaŭ egalan al la dolara pozitiva saldo.

La netuŝita naturo ĉe Danubkurbo



PANORAMO

La vivanta popolarto en Hungario

Radio Pécs en Esperanto

Radio Pécs (Peĉ), regiona stacio de Hungara Radio ankaŭ ĉi-jare disaŭdigas esperantlingvajn programojn en la monatoj *junio, julio* kaj *aŭgusto.* La elsendoj okazos ĉiun vendredon inter 18.25 kaj 18.30 laŭ la somera hungara tempo. (GMT: 16.25-16.30.) La programoj enhavos turistajn kaj movadajn informojn. La esperantlingvaj disaŭdigoj estos kapteblaj en la suda parto de Hungario kaj en kelkaj nordaj regionoj de Jugoslavio. Ondolongoj: *343 m (873 kc)* laŭ la meza ondo kaj *67,19 Mc* laŭ la ultrakurtondo.

La unua elsendo okazos la 3-an de junio, la lasta la 26-an de aŭgusto. Reagojn bv. sendi al: Radio Pécs, Esperanto, Pécs Pf. 200, Hungarujo, H–7601.

Trabant-oj el GDR – populara marko en Hungario

Novaj Lada-oj el Sovetio ne longe atendas aĉetantojn

Aŭtomobiloj en Hungario

Iom pli ol unu miliono da privataj aŭtomobiloj kuras sur la hungaraj ŝoseoj; tio signifas, ĉiu deka persono aŭ ĉiu kvara familio posedas aŭtomobilon. La plej peza ŝarĝo por aŭtomobilistoj – kiel ĉie en la mondo – estas la prezo de benzino, kiu dum la lastaj jaroj svingiĝis alten: meza monatsalajro sufiĉas nur por 250 litroj. Aliflanke, benzino ĉiam aĉeteblas sen limigo.

La plej popularaj markoj en Hungario estas soveta *Lada,* GDR-a *Trabant,* ĉeĥoslovaka *Škoda* kaj lastatempe rumana *Dacia.* Praktike por ĉiuj markoj necesas atendi, kaj tiu atendado ĉe iuj tipoj de *Lada* povas atingi ses jarojn! Alia zorgo estas ke ne ĉiam kaj ne ĉiuj pecoj estas aĉeteblaj. Krom la supraj markoj troviĝas ankaŭ okcidentaj aŭtomobiloj (ĉefe *Wolkswagen, Fiat, Opel*), eĉ, jam aperis pluraj japanaj tipoj (*Toyota, Daihatsu* ktp.), sed ties prezo almenaŭ duoble superas tiujn de la samkarakteraj aŭtomobiloj el socialismaj landoj.

La aventuroj de Huckleberry Finn

Mark Twain:

«La aventuroj de Huckleberry Finn» estas la kvina libro de la bildrakonta serio de Hungara Esperanto-Asocio. Tiuj, kiuj havas la ĝisnunajn kvar verkojn, certe volas havi ankaŭ la kvinan – precipe, ĉar ĝi estas fakte daŭrigo de la kvara, «La aventuroj de Tom Sawyer».

Mark Twain: La aventuroj de Huckleberry Finn. 32 p. 24 cm. Kun koloraj kovrilpaĝoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. ISBN 963 571 1O5 O. Prezo: 4,80 gld.

REVUO DE REVUOJ

LA HARMONIO (117.) alportis vere stimuloplenan ĝojon al la kronikisto, leganta ĝiajn – nun – ne japanlingvajn paĝojn, kiuj troviĝis en antaŭaj numeroj pro la multaj komencantoj. Ĝojon mi elkriis, prave, ĉar tre manifestiĝas moderntipa kaj (pli grava!) tra tuta Japanio *sukceshava* „movad-organizo kun klara celo kaj projekto efektivigi la Lingvon Internacian." Mem la principo, plimultigi konsciajn esperantistojn, kiuj mem daŭrigos tiun plimultigon, do ade kreante fekundajn kernojn, en si mem ne estas io nova. Dinamismaj movadoj ĉiam klopodis apliki ĝin, dum la efektiva sukceso dependas de la konsekvenca agado. Feliĉe, videblas, ke en la vastiĝinta Rondo Harmonia agas lerte la „tavoloj" de studentoj, lernantoj kaj civitanoj (ne-studentoj), kiuj apartiĝas nur pro praktikaj kaŭzoj' ili studas per kaj pri Esperanto, samtempe praktikante kaj disvastigante ĝin. La gazeto insistas, ke RH havas planojn kaj sciencan teorion, rigardante la movadon el dinamisma vidpunkto. La membreco signifas tie energian aktivecon, dum kiu oni pli konsciiĝas por nia afero! Ne mankas do elano en la japana movado, kie la *socia fenomeno Esperanto* denove forte reliefigas sin inter la loĝantaro.

Eble iuj nomos la movadon de RH „subkulturo", kion mi ne povas konsenti: oni lasu tiun ĉi negative sonantan terminon al la *vere sub-strate* ekzistantaj grupiĝoj, kies „kulturo" aperas nur malsuper tiu kulturo, kiun la geniuloj de la homaro igis *alten* evolui tra la jarmiloj. KONTAKTO (74.) kunmetis tre interesan kaj multfacetan enhavon pri „la familio en krizo", kio tra granda parto de la mondo ekigas profundajn problemojn. Fuĝi de antaŭ la familiaj strecoj – ĉu vere, ĉu image suferigaj – al diversaj grupoj, jen orientecaj, jen Usonecaj, ne maleblas, sed fakte „la kontentiĝo" helpe de iliaj subkulturoj nur malofte alvenas – pri tio ankaŭ mi konsentas kun la cetere prudenta artikolo de J. *Junger.* Estas tute ne mirinde, ke homoj *serĉas* nuntempe pli taŭgajn manierojn por plenumi sian vivon, kaj ne estas cinike konscii, ke eksperimentadoj ofte finiĝas en sakstrato (kies malnova, jam „tradicia" ekzemplo estas la fuĝo en la alkoholismon.) Ne surprizas min, ke la plej saĝaj opinioj pri la temo devenas de Hindua edzino, *Manashi Das Gupta.* Ŝi prave atentigas, ke disfalo de tradicia familio senigas la individuojn de ofte necesa subteno, ja infanoj vole-nevole estas biologie/psikologie ligitaj al gepatroj, iliaj komunaj interesoj povas superi la individuajn for-avantaĝojn. Kompreneble tio bezonas kulturon – sed veran.

En nia internacieca movado necesas daŭri konduki la pensojn for de Eŭropcentrismo, kio ja reaperas novedenove. Mi legis do kun plezuro en MONATO (12.) la spritan atentigon de *Stefan Maul* „al la okcidentanoj inter ni", ke bildoj sur koverto ekzemple pri Paskofesto, en aliaj mondpartoj spegulas alian, eĉ fremdan sencon, pro aliaj religioj aŭ kutimoj. Ho, kiom malfacile estas forigi el la cerbo la pradevenan senton-imagon, ke la Universo turniĝas ĉirkaŭ ni, ke *aliaj* popoloj ne estas balbutantaj, bar-bar-diraj aŭ „mutaj" (ĉar ni ne komprenas ilian parolon), nek stupidaj, stranguloj aŭ malaltnivelaj (ĉar ili ne sekvas niajn tradiciojn). Same ni devas – internacilingvanoj – senkolere legi pri la vere bedaŭrinda baraktado de Eŭropa Komunumo pro la plurlingvaj interpretadoj. Pro ilia malagrablega trejnado, kiel ni sciiĝis el la interesa intervjuo, refortiĝas nia konscio, ke *tiu* arkaiĝanta metodo jam ne longe ekzistos. La modernan reprezentas mem Monato, la ĝuste tri-jara, esperplena infano, kiu tamen bezonas ankoraŭ – prave dirite – varman vartadon de la publiko. Ni atendis ja delonge ĝin: la profesinivelan, buntan, pli kaj pli seriozan revuon.

Komunikad-problemoj havas nun pli da rajto prezentiĝi, kiam la jaro de komunikado tiras al si la atenton. Malagrabla unudirekteco de la novaĵoj el anglosaksaj landoj, pro kelkaj grandaj novaĵagentejoj superŝutas i.a. Nederlandon – laŭ siaj elektoj kompreneble. Pri tiu inform-dependeco levas voĉon KOMUNA E-GAZETO: legantoj kaj rigardantoj ricevas limigitan bildon pri evoluo de malgrandaj (malriĉaj) landoj. Alivorte: la potencon de la imperioj bremsi necesas „nova ordo de informado", favora al la etaj kaj evolulandoj. Espereble, la kongreso en Budapeŝto traktos tiun temon laŭmerite kaj kune kun fakuloj neesperantistaj.

El Kanado ĉi-jare venis novmaniere redaktita LUMO: en ĝia fokuso troviĝas la kluba vivo! Kvazaŭ antologio de societaj ludoj kaj kantoj, distroj por pli-malpli komencantoj abundas en la dikiĝintaj, plaĉ-aspektaj kajeroj. Fortikiĝo de la tiea movado – helpe de kreskanta, kuraĝa aktivularo antaŭ UK en Vankuvero venontjare – videblas en spegulo de la revuo. Ŝajnas bona metodo por atentigi pri nia mondvasta movado, ke ĝi represas tutajn paĝojn de la gravaj E-revuoj (ankaŭ plurajn de H.V.), tiuj estas ja indaj por aboni kaj legi ĉie en la mondo. Do, helpeme propagandi ilin estas bonvene: tion servas ankaŭ ĉi rubriko.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

La akvomastrumo antaŭ la hungara parlamento

La prezidanto de la Landa Hidrologia Instanco, ŝtatsekretario Antal *Kovács* dum la aŭtuna sesio de la parlamento de Hungario amplekse raportis pri la aktuala kaj perspektiva stato de la akvomastrumo. La deputitoj plurflanke diskutis pri tiu ĉi vasta, multajn interesanta afero, kies tutlanda graveco igis la parlamenton ripete meti ĝin sur la tagordon.

La ŝtatsekretario unue emfazis, ke la akvomastrumo disvolviĝis kune kun la landa ekonomio – sekve kunportis ankaŭ ties karakterizajn zorgojn. Ĝi estis kapabla kontentigi la bezonojn de la lando, kaj plenumis la antaŭvidojn de la kvinjaraj tutlandaj planoj. La akvoprovizo de la loĝantaro kaj de produktado iĝis pli glata; oni sukcesis malpliigi la akvodamaĝojn kaj disvolvi la industriigon kaj tipizadon de la hidroteknika konstruado; ĝenerale kreskis la teknika nivelo de la akvomastrumo.

Dum la lastaj kvin jaroj la hidrologia servo povis realigi sian ĝis nun plej grandan disvolvon, per 40% ampleksigante sian firman havaĵon. Rezulte la akvokonsumado de la lando (4,5 miliardoj m^3) okazis senĝene; per unu miliono kreskis la nombro de tiuj, kiuj estas provizataj per sana akvo; en 300 vilaĝoj oni instalis akvoprovizejojn, kaj la akvoprovizado iĝis pli glata en la grandurboj Miskolc, Debrecen, k.a.

Tamen la ekonomio en Hungario konsumas pli da akvo, ol estas nepre necese. Troviĝas ja ankaŭ favoraj ekzemploj: la produkto de ŝtalo jam konsumas malpli da akvo, ol averaĝe en Eŭropo; la industrio mapliigis la freŝakvo-konsumon ĝis 25% de sia akvobezono. Sed ankaŭ ties kvaronon eblas anstataŭigi per pli malbonkvalita akvo, kio montras klare la pluajn ŝpareblojn. Cetere, ankaŭ la loĝantara konsumado ne estas sufiĉe ŝparema.

Koncerne la akvohavaĵojn ŝajnas plej grava la utiligo de la precipitaĵoj. De tiuj jare 58 miliardoj m^3 falaspluvas en Hungario, sed kaprice distribuiĝante laŭ tempo kaj loko. Tio estas ne ŝanĝebla geografia fenomeno, tamen la agrikulturo povus ĝin pli favore utiligi, se la defluado estus pli regulita kaj oni zorgus pri la grundakvo. Ĉi-lasta estas ege grava por la grundoj, kaj tiucele estis inaŭgurita la melioracia programo de la registaro. Por plenumi la programon de la nutraĵproduktado ŝajnas necese revizii la irigaciajn manierojn. Estus tre malbone daŭre lasi sen uzo la irigaciajn ekipaĵojn kaj la akvohavaĵon.

Akvoprovizado kaj kloakakvoj

Por la publika akvoprovizo jam nun – kaj venonte eĉ pli – estas granda problemo la elĉerpiĝo de la lokaj akvohavaĵoj kaj la endanĝerigo de la utiligeblaj akvoj, ofte eĉ ilia kvalita malboniĝo. Pro tio kreskas la rolo de la regionaj akvoproduktaj-provizaj sistemoj, kiel plej ofte la solaj ebloj. Oni devas apliki lokajn, simplajn teknikajn metodojn – per ili oni kapablas eventuale provizi malgrandajn regionojn. Troviĝas lokoj kun malabunda akvo, tie povas esti necesaj ankaŭ publikaj putoj.

Kvankam la kostoj de la akvoprovizado lastatempe grave altiĝis, oni projektis provizi per akvokondukiloj pliajn 700 mil loĝantojn kaj 250 vilaĝojn. Tiamaniere 81-83% de la loĝantaro en la lando akiros akvon pere de publika provizado. Tiu disvolvo direktiĝos precipe al grandurbaj periferioj ankoraŭ ne provizitaj, kaj al ne sufiĉe ekipitaj provincoj. Estos krome organizita la provizado en 500 vilaĝoj kun ĉ. 300 mil loĝantoj, kies akvo estas sanitare maltaŭga. La provizado de vilaĝoj ankaŭ estonte disvolviĝos pere de la akvo-kompanioj, kiu formo montriĝis konvena. La ŝtata subteno tiucele kreskos, sed necesos ankaŭ plia kontribuo

Fontanoj agrable refreŝigas la aeron



Riverkanalo kiel refreŝigejo (Szarvas)

de la lokaj entreprenoj kaj de la loĝantaro.

Sekve de la publika rekono de la medioprotekto, la akvo jam sufiĉe frue – depost du jardekoj – akiris ekonomian, administran kaj juran protekton. Tiel formiĝis – per grandaj intelekta kaj financa subtenoj – nova publika rilato al la akvo. Dank' al multaj disponoj la malboniĝo de la akvokvalito malakceliĝis, eĉ en kelkaj etapoj de Danubo kaj Tiso okazis iom da boniĝo. Tutlande malkreskis la poluciado per organikaĵoj kaj petrolo, tamen la protekto de la akvokvalito restas gravega tasko de la socio, ĉar 80-90% de niaj akvoj estas jam „meze poluciitaj".

Oni devas disvolvi la poluakvopurigajn instalaĵojn en la baseno de Balatono, ĉe la norda parto de Danubo kaj en la tieaj grandurboj, en la ĉefurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, krome en pluraj industriaj urboj kaj aliloke, kie ne troviĝas riceva akvejo. La traktadon de poluakvoj en malgrandaj loĝlokoj oni devas fari per simplaj kaj malmultekostaj instalaĵoj.

En la industrio oni devas pli instigi la modernan mastrumadon koncerne akvon kaj akvokvaliton. Nuntempe la jara kresko de ĝia akvobezono estas 0,9%, kiu devas ne altiĝi. La purigon de la industriaj kloakakvoj oni intensigu unuavice per ekstrakto de materialoj kaj per ripeta uzo. Estu pli racia la akvomastrumado interne de la fabrikoj, praktike plenumebla ekzemple dum teknologiaj rekonstruadoj.

Tiurilate la plej gravaj taskoj restas ankaŭ estonte la ŝparema uzo de freŝakvo kaj ĝia reuzo; la apliko de teknologioj per malpli da akvo aŭ per ties plurfoja recirkuligo; la altrudo per teknikaj, ekonomiaj kaj juraj manieroj, ke la industrio sole tiukaze uzu trinkakvon, kiam ĝi estas nepre neevitebla, cetere oni uzu malaltkvalitan akvon.

En la industria akvomastrumo ege urĝas kaj estas jam neevitebla la modifo de tiuj fabrikmetodoj, kiuj efikas malfavore la medion. Oni devas uzi

Akvoturoj servas la vilaĝojn



Moderna akvopurigejo (Norda Peŝt)

tiajn teknologiojn, kiuj „indulgas" la akvon, t.e. eligas malpli da kloakakvo, eĉ tiun recirkuligas en la fabrikadon. Grava estas la ekonomia intereso tiurilate, ke la reuzeblaj materialoj estu ekstraktataj el la kloakakvoj. Dum nelonga tempo oni devas alveni al tio, ke la fabrikoj elfluigu nur traktitan poluakvon.

Elstare grava estis la sukcesa antaŭenpaŝo koncerne la protekton de la Balatona akvokvalito. Laŭ la programo pri forfluigado kaj purigado de kloakakvoj en la tuta Balatona baseno, la puriga kapacito kreskos per 50% ĝis 1985. Tiucele, ke en Balatonon eĉ purigita kloakakvo ne enfluu, ties 40% estos forkondukata al alia baseno kaj 20% nerekte (tra marĉo) povos atingi la lagon. Por grave malpliigi la ŝarĝadon de la golfo de Keszthely kaj la akvon apud la suda bordo, ni ekkonstruis akvoprotektan sistemon ĉe la Malgrand-Balatono. La materialo, kiun la akvokvalit-cela dragado forigas, estos uzata por ordigi misajn golfetojn kaj bordajn etapojn.

Dank' al la jamaj plenumaĵoj, la altirforto de Balatono por la en- kaj eksterlandaj vizitantoj daŭras, kion markas ilia kreskanta nombro. Sed ĝuste tial restas la devo de la Balatonon uzantaj gastoj, kaj de la tie vivantaj loĝantoj: gardi zorge la purecon kaj la ordon, ĉar la malpuraĵoj de la akvo devenas de la bordo kaj de ĝia regiono.

Prevento de akvodamaĝoj

Por preventi kaj forigi la damaĝojn de inundoj kaj de surgrundaj akvoj, kontinue estas konstruataj kaj firmigataj pluaj inundprotektaj establaĵoj. Bravaj spertoj igas nin modernigi kaj firmigi unuavice la digojn de la riveroj Tiso kaj Körös. La kontraŭinunda protektado ĉiam havas siajn riskojn. Pro tio oni devas apud la firmigitaj, ankaŭ apud la ankoraŭ ne moderne firmigitaj digoj organizi la ŝirmadon kontraŭ la eventuale alvenonta inundo. Tio postulas fortikigi la ŝirmantan organizaĵojn, kontinue modernigi ĝiajn teknikajn rimedojn, krome levi la efikecon per sciencaj metodoj – precipe pere de prognozoj.

Koncerne la surgrundan altakvon, la prezidanto de la Landa Hidrologia Instanco rimarkis, ke preskaŭ la duono de la lando – 41 mil km^2 – estas minacata de altakvo. Malgraŭ la abunde lokitaj protektaj establaĵoj, averaĝe 100 mil hektaroj estas ĉiujare kovritaj per altakvo, sed eventuale 2-3-obla estas la areo damaĝita pro la troa grunda malsekiĝo. Dum malkreskis la inunda areo kaj la daŭro de la forfluigo, la damaĝoj kaŭzitaj de la altakvo kreskis.

La sekureco de la agrikulturo nun pli forte postulas instali pluajn establaĵojn por forigi la altakvojn. Tiuj iĝis pli oftaj ĉe la loĝlokoj, kie funkcias jam kondukita akvoprovizo sed kanalizado ankoraŭ ne; pro la enfiltriĝo de la pli multa akvo signife altiĝis la nivelo de la grundakvo.

La evoluo de la agrikulturo urĝe bezonas reguligi la akvobilancon de la grundo. La teknika evoluo de la agrikultura produktado, la aplikado de kemiaĵoj kaj maŝinoj kaj alispecaj modernaj teknologioj lanĉas pli altajn postulojn koncerne la akvomastrumon. La pli fruan tendencon, kiu direktiĝis al prevento de la damaĝoj, oni devas anstataŭigi per la deziro reguligi la tutan akvobilancon. Tiel, la fundamenta celo de la akvoreguligo iĝas la optimuma utiligo de la precipitaĵoj, sekve nur la surloke ne uzeblaj, malutilaj akvoj estas forkondukindaj.

Dum la lastaj jardekoj establiĝis – precipe oriente de Tiso – la grandaj plurcelaj ŝtataj hidrologiaj instalaĵoj, kiuj provizas la *irigacion*. La irigaciaj sistemoj estas establitaj sur ĉ. 450 mil hektaroj, sed el inter la irigaciaj ekipaĵoj kaj stacioj eluziĝis, difektiĝis aŭ necesas renovigi tiom, kiuj provizas ĉ. 200 mil hektarojn. Pro tio oni nun komencas vaste rekonstrui la kadukiĝintajn ĉefajn instalaĵojn. Plu daŭras la disigo de la du-celaj kanaloj (fluigantaj kaj forigendan altakvon, kaj irigacian akvon), kaj la finpretigo de jam konstruataj investaĵoj.

Kune kun aliaj branĉoj, hidrologio havas la taskojn sisteme kunlaborante establi akvovojojn, utiligi akvoenergion kaj la energion de termakvoj. La ekonomie utiligebla akvoenergio de Hungarlando estas taksebla je povo de 4500 GWh, resp. 850 MW. El la ŝipvojoj de la lando 1384 km estas navigeblaj. Tamen Danubo estas tiucele nur parte utiligata, kaj la navigado sur Tiso estas sensignifa.

La termakvo-rezervoj estas gravaj ankaŭ en tutmonda rilato; estas uzenda ankaŭ ilia geotermika energio, per kiu perspektive estus ŝpareblaj jare 3-400 mil tunoj da nafto. La utiligo de tiuj kapabloj atingis nur la unuajn paŝojn ĝis nun.

Perspektivaj planoj pri la akvomastruma disvolvo

Estas registara celo, ke ĝis la jarcent-fino la tuta loĝantaro de la loĝ-

lokoj estu provizata per *alkondukita akvo*. Oni devos zorgi ankaŭ pri la periferiaj, dislokiĝintaj kaj aparte vivantaj loĝantoj, por provizi ilin per bonkvalita trinkakvo. Tiamaniere ĝis la jaro 2000 almenaŭ 90-95% de la tuta loĝantaro estos provizata per bona akvo. La plejparto de la nun ne provizata loĝantaro vivas en 1600 vilaĝoj (el tiuj en 750 vilaĝoj eĉ la fositaj putoj donas akvon malkonvenan); sekve ilin provizi per akvo estas unue farenda.

Kreskas la nombro de la pli komfortaj loĝejoj kaj sekve kreskas ankaŭ la akvokonsumo de la loĝantaro. Oni kalkulas, ke ĝis la jaro 2000 la akvokonsumo de la loĝantaro, kune kun tiu de la publikaj organizoj kaj institucioj, atingos jare 1,1 miliardojn da m^3.

Laŭ la nun konataj tendencoj de disvolvo, la industrio konsumos el freŝakvo ĉe la jarcentfino 10,5 miliardojn da m^3 – kaj el tiuj la elektroenergia produktado bezonos 9,3 miliardojn da m^3.

Dank' al la klimato de Hungario, la akvobezono de la *agrikulturo* (kreskaĵoj) laŭ la nuntempa produktad-nivelo estas plejparte kontentigebla el precipitaĵoj. Sed la perspektivaj planoj de la agrikulturo – precipe pro la nutraĵ-problemo – igas tre necese pliigi la produktaĵojn. Tio postulos plian irigacion, precipe por la akvopostulemaj kultivaĵoj.

La suma areo de la *fiŝlagoj* estas ĉ. 25 mil hektaroj, kvankam eblas doni akvon al multe pli da fiŝlagoj. Inter aliaj ankaŭ la plurcelaj akvorezervujoj estas uzeblaj de fiŝistoj, kompreneble pere de aldonaj fiŝistaj ekipaĵoj.

Resume, ĉirkaŭ la jarcentfino la freŝakva bezono de la agrikulturo estas taksebla jare 1,6-2,0 miliardoj da m^3.

Estas bone konata malagrabla tendenco, ke kune kun la ĉiurilata progreso kreskas ankaŭ la minaco de poluciado en la akvohavaĵoj, ĝuste tiam, kiam kreskas la kvalitaj postuloj rilate la akvon. El tio sekvas la plej gravaj taskoj de la akvomastrumo, ankaŭ en perspektivo: kolekti la uzitan kaj poluciitan akvon, purigi kaj sendanĝere



Flosanta akvoelpumpejo sur Tiso

Disŝpruca irigacio tre favoras la produktadon





Drentubojn profundiga maŝino helpas la melioracion

lokigi, respektive utiligi ilin. Tiu agado estas nemalhavebla, se oni volas protekti la akvohavaĵojn disde la pliiĝanta poluciado.

Malgraŭ la nepra bezono de tiu tutlanda tasko, la vere atingebla celo devas resti ĝis 2000 ankoraŭ ne tiom alte. La praktika celo povas esti nur kvindek-procenta kanalizado de la tuta loĝejaro. La kloakakvon de la ne kanalizitaj vilaĝoj oni devos lokigi post taŭgaj teknologiaj kaj sanitaraj traktadoj. Fine de la jarmilo la tuta kloakakvo-forigo (kun la uzita akvo) flanke de la industrio estos atendeble jare ĉ. 10 miliardoj da m^3 (mem la elektroenergio-industrio eligos 9 miliardojn da m^3 fridakvon!)

De la industriaj akvouzantoj estos nepre postulata taŭga purigado de la uzita kaj kloaka akvo, kiuj nur post tia traktado devos enflui en la ricevajn akvejojn. Simile, en la publikan kloakaron oni devos nur antaŭpurigitan kloakakvon enlasi, kiu jam povas damaĝi nek la kloakreton, nek la komunuman traktadon de la poluakvoj. Estus tre praktike pli amase reakiri uzeblajn materialojn el la kloakakvoj, tiujn klopodojn ni subtenu; same la reuzadon de la purigitaj industriaj poluakvoj.

La agrikultura poluciado malagrable ŝarĝas la sur- kaj subterajn akvojn. Precipe la kreskanta kemiizado kaj la grandaj bredejoj kaŭzas en ili nedezirindajn procezojn, kiujn likvidi kaj preventi estas komuna tasko de la interesitoj. La flanka industria agado ene de la agrikulturo kompreneble havas similajn efektojn de poluciado kiel la ceteraj fabrikoj. Sekve ankaŭ ili devas integri la poluakvo-purigon en siajn teknologiajn procezojn.

Ekzistas ebloj por taŭge utiligi kloakakvojn kaj kloakŝlimojn en agrikulturo kaj arbarkulturo. Tio okazas nun sporade, sed estas necese plivastigi tiajn uzeblojn.

Lastatempe multe transformiĝis la protektado kontraŭ akvodamaĝoj. La ĝis nun unucelajn manierojn de la akvodamaĝa protektado anstataŭas plurcelaj manieroj, kiuj apud la pro-

tektado servas al pluaj utiligoj: akvorezervado, grundakvo-reguligo, akvokvalito-protekto, ekologiaj kaj ceteraj celoj estas tiamaniere plenumeblaj.

La kontraŭinunda protektado en Hungario disvolviĝis dum longaj historiaj epokoj. Ĝia nuna sistemo – signifa ankaŭ en monda rilato –, ĝiaj rimedoj kaj organizaĵoj estas vere historia rezulto. La perspektiva programo pri la protektaj konstruadoj antaŭvidas gravan fortikigon de la ĉefaj protektodigoj. Ili devas prezenti sekurecon eĉ kontraŭ tiaj inundegoj, kiuj okazas – laŭ statistiko – eble nur unufoje dum jarcento. Sed en regionoj, kiuj bezonas precipe grandan sekurecon (Budapeŝto, Győr, Szeged, k.a.), la protektaj digoj devas elteni eĉ tian inundegon, kiu statistike okazas nur unufoje dum jarmilo. Post realigo de la programo, la unuarangaj protektaj linioj entute akiros longon de 4260 km.

La landan *akvoreguligon* determinas bedaŭrinde malfavoraj naturaj cirkonstancoj. Tiurilate oni celas, ke ĝis la jaro 2000 la pumpstacioj atingu 800-850 m^3/s kapaciton; koncerne la internajn altakvojn, la pumpstacioj estu kapablaj sur ĉiu kvadratkilometro forigi 35-37 litrojn dum sekundo.

La rezervadon de utilaj akvoj kaj la forigon de la malutilaj oni devas plenumi akordigante kun la kompleksa agromelioracio. Laŭsisteme farante tion, eblas reguli ankaŭ la akvobilancon de la grundo – kaj de tio grave dependas produktiveco kaj rendimento en la agrikulturo, krom la plia sekureco de la produkto.

La akvomastrumadon en Hungario laŭsisteme determinas la perspektivaj popolekonomiaj planoj, kaj surbaze de ili, la perspektivaj programoj de la lando, kaj ties hidrologia ĉapitro, difinantaj la farendojn de la branĉo. Pere de tiu planada sistemo, la akvomastrumo akordas kun la antaŭvidata evoluo de la socio kaj ekonomio, kaj tiamaniere ĝi povas adaptiĝi al ili, al la lokaj bezonoj de la diversaj branĉoj kaj de la loĝantaro.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Sur la glacikovrita Danubo specialaj rompŝipoj laboras

Ĉe la refreŝiga Balatono

„Mi ege ŝatas tiun bonan soldaton kaj, prezentante lian sorton dum la mondmilito, mi estas konvinkita, ke vi ĉiuj simpatios kun tiu modesta, nerekonita heroo. Li ne bruligis la templon de la diino en Efezo, kiel faris tiu stultulo Herostrato por eniri gazetojn kaj legolibrojn de lernejanoj. Kaj tio sufiĉas." Tiel antaŭparolas ĉeĥa furnalisto kaj verkisto Jaroslav Haŝek *(1883–1923) al sia nefinita romano* La brava soldato Ŝvejk, *kiu dum la lastaj ses jardekoj famiĝis en pli ol kvardeko da lingvoj. Ĉi-jare UNESKO omaĝas la 100-jaran naskiĝ-datrevenon de la aŭtoro. El lia ĉefverko ni prezentas fragmenton.*

DOBOSSY LÁSZLÓ

HAŠEK világa

La brava soldato Švejk

Jaroslav Hašek

Kiam Ŝvejk matene eniris la ĉambron de la soldatpastro, li trovis tiun kuŝi sur kanapo, diligente rezonanta, ke iu priverŝis lin per maniero tiel kurioza, ke li gluiĝis per pantalono al la leda kanaplito.

– Obee mi raportas, sinjoro soldatpastro, ke nokte vi...

Ŝvejk kelkvorte eksplikis al li, kiel terure li eraras esti priverŝita. La soldatpastro, al kiu la kapo neordinare pezis, estis deprimita.

– Mi ne povas rememori – li diris –, kiel mi trafis de lito al kanapo.

– Tie vi tute ne estis, tuj post la alveno mi metis vin sur la kanapon, ne eblis pluen.

– Kaj kiajn petolaĵojn mi faris? Ĉu mi petoladis entute? Ĉu eble ebria?

– Pli ol decas – respondis Ŝvejk. – Komplete, sinjoro soldatpastro, vi deliris bagatele. Espereble helpos, se vi alivestiĝos kaj lavos vin.

– Mi fartas kvazaŭ iu tradraŝus min – plendis la soldatpastro, plue, mi soifas. Ĉu mi ne interbatiĝis hieraŭ?

– Ne okazis plej malbone, sinjoro soldatpastro. Soifon sekvigas la soifo hieraŭa. De tio oni ne eskapas rapide. Mi konis lignaĵiston, kiu ebriiĝis unue je la Silvestra vespero en 1910, kaj la unuan de januaro matene li jam tiom soifis kaj tiom malbonfartis, ke li aĉetis haringon kaj trinkis denove, kaj tion li faras ĉiutage jam kvar jarojn kaj neniu lin helpos, ĉar ĉiusabate li aĉetas haringojn por la tuta semajno. Estas karuselo, kiel kutimis diri unu maljuna suboficiro ĉe la 91-a regimento.

La soldatpastron suferigis perfekta postebrio kaj kompleta depresio. Se iu aŭdas lin tiumomente, tiu devus esti konvinkita, ke li frekventas la prelegojn de d-ro Aleksandro Batĕk „Ni deklaru militon je l' kosto de la vivo kaj morto kontraŭ demono-alkoholo, kiu murdas al ni virojn plej bravajn" kaj ke li legas ties verkon „Cent inspiroj pri l' etiko".

Cetere, iomete li variigis tion. – Se – li diris –, temus pri iaj noblaj trinkaĵoj, kiel arako, maraskino, konjako; sed mi trinkis hieraŭ juniperbrandon. Mirinde, ke mi kapablas tiom trinkegi ĝin. Laŭ la gusto ĝi estas abomena. Se estus almenaŭ griotaĵo. Oni elpensas diversajn aĉaĵojn kaj trinkas ilin kiel akvon. La juniperbrando estas nek bongusta nek kolorhava, gorĝobruliga. Kaj se ĝi estus almenaŭ aŭtenta junipera distilaĵo, kian mi foje trinkis en Moravio. Sed tiu ĉi estis el iu lignoalkoholo kaj oleoj. Rigardu, kiel mi ruktas.

– La brando estas venenaĵo – li resumis –, ĝi devas esti origina originalo, aŭtentika, kaj ne fabrike produktita far judoj sen kemia tekniko. Estas same kiel pri rumo. Bona rumo estas raraĵo.

Se estus almenaŭ originala juglandbrando tie ĉi – li ekĝemis –, tiu riparus al mi la stomakon. Juglandbrando, kian havas sinjoro hetmano Ŝnábl en Bruska.

La komencis poŝumi kaj traekzameni la monujon.

– Ni havas entute 36 krejcerojn. Ĉu vendi la kanapon – li meditis –, kiel vi opinias? Ĉu iu aĉetos la kanapon? Al la dom-mastrino mi diros, ke iu pruntepreni ĝin aŭ ŝtelis. Ne, la kanapon mi retenos. Mi sendos vin al sinjoro hetmano Ŝnábl, por ke li pruntu al mi cent kronojn. Li gajnis antaŭhieraŭ kartlude. Se tie vi ne sukcesos, tiam iru kazernon en Vrŝovice al ĉefleŭtenanto Mahler. Se tio ne sukcesos, iru en la Pragan Kastelon al hetmano Fiŝer. Al tiu diru, ke mi devas pagi ĉevalfuraĝon, kiun mi fordrinkis. Kaj se eĉ tie vi ne sukcesos, mi lombardos la fortepianon. okazu kio ajn. Mi skribos al vi skize kelke da linioj. Ne lasu vin forrifuzi. Diru, ke mi bezonas, ke mi estas senmona. Elpensu, kion vi volas, nur ne revenu kun manoj malplenaj, ĉar mi ekspedos vin al la batalkampo. Demandu de hetmano Ŝnábl, kie li aĉetadas la juglandbrandon kaj aĉetu du botelojn.

Ŝvejk brile plenumis sian taskon. Liaj bonkoreco kaj honesta aspekto plene fidindigis, ke liaj vortoj egalas veron.

Ŝvejk trovis konvene paroli antaŭ hetmano Ŝnábl, hetmano Fiŝer kaj ĉefleŭtenanto Mahler ne pri tio, ke la soldatpastro devas pagi furaĝon por ĉevaloj, sed subtenis ties peton proklamante, ke la pastro devas pagi alimentojn. La monon li ricevis ĉie.

Kiam li elmontris tricent kronojn, honeste reveninte

de la ekskurso, la soldatpastro, kiu dume sin lavis kaj alivestis, estis tre surprizita.

– Mi faris tion je unu fojo – diris Ŝvejk –, ke ni ne devu morgaŭ aŭ postmorgaŭ denove okupiĝi pri la mono. La procedo estis sufiĉe glata, sed antaŭ hetmano Ŝnábl mi devis genui. Estas ia monstro. Tamen, kiam mi diris, ke ni devas pagi alimentojn...

– Alimentojn? – konsternita ripetis la soldatpastro.

– Nu, alimentojn, sinjoro soldatpastro, vivtenon al knabinoj. Vi diris, ke mi elpensu ion, kaj mi povis eltrovi nenion alian. Ĉe ni unu ŝufaristo alimentis kvin knabinojn samtempe kaj malesperis pro tio komplete kaj ankaŭ pruntepreNadis tiucele kaj ĉiu volonte kredis lin troviĝi en terura situacio. Oni demandis min, pri kia knabino temas, kaj mi diris, tre bela, apenaŭ dekkvinjara. Do oni postulis ŝian adreson.

– Jen, bele vi misfaris, Ŝvejk – ekĝemis la soldatpastro kaj ekis paŝadi tien kaj reen tra la ĉambro.

– Jen, denove bela hontindaĵo – li diris manoj-ĉe-kape, – al mi tiom doloras la kapo.

– Mi disponigis al ili adreson de iu olda surda sinjorino en nia strato – eksplikis Ŝvejk. – Mi volis plenumi tion funde, ĉar ordono estas ordono. Mi ne lasis min malakcepti – do, kaj ion mi devis eltrovi. Krome, en la antaŭĉambro oni atendas je fortepiano. Mi venigis ilin por ke ili veturigu ĝin en lombardejon, sinjoro soldatpastro. Ne okazos malbone, se tiu fortepiano estos for. Estos pli da spaco tie ĉi kaj ni havos pli da mono kune. Kaj ni povas esti trankvilaj kelkatage. Kaj se la dommastro demandos, kion ni intencas fari kun tiu fortepiano, mi diros, ke la dratoj ene malstreĉiĝis kaj ke ni ekspedis ĝin al la fabriko por riparo. Al domzorgantino mi jam diris, ke ŝi ne suspektu nin, kiam tiun fortepianon oni elportos kaj pretigos por transporto. Mi trovis ankaŭ aĉetonton de la kanapo. Estas nia konato, komercisto per malnovaj mebloj, kiu venos posttagmeze. Nuntempe la leda kanaplito estas bone pagata.

– Ĉu nenion pli vi misfaris, Ŝvejk? – demandis la soldatpastro kun la kapo daŭre en la manoj, mieno malespera.

– Obee mi raportas, sinjoro soldatpastro, ke anstataŭ du boteloj da juglandbrando, kian aĉetadas sinjor' hetmano Ŝnábl, mi aĉetis kvin por havigi al ni ian provizon, por havi trinkaĵon. Ĉu oni envenu por tiu fortepiano antaŭ ol fermiĝos la lombardejo?

La soldatpastro svingis senespere la manon kaj baldaŭ oni jam surĉarigis la pianon.

Kiam Ŝvejk revenis de la lombardejo, li trovis la soldatpastron sidanta antaŭ malfermita botelo kaj sakranta, ke tagmanĝe li ricevis fuŝbakitan viandan tranĉaĵon.

La soldatpastron regis denove lia kutima humoro. Al Ŝvejk proklamis, ke ekde morgaŭ li vivos alimaniere. Ke trinki alkoholon estas kruda materiismo kaj ke necesas vivi spirite.

Li filozofiis ĉirkaŭ duonhoron. Kiam li malkorkis la trian botelon, venis komercisto per malnovaj mebloj kaj la soldatpastro vendis al li por bagatela sumo la kanapon, invitis lin al amika interbabilo kaj tre maltrankvilis, kiam la komercisto adiaŭis por iri aĉeti ankoraŭ noktotablon.

– Domaĝe, ke mi nenian havas – notis riproĉe la soldatpastro –, oni ne ĉion primemoras.

Post kiam foriris la komercisto per malnovaj mebloj, la soldatpastro komencis amike amuziĝi kun Ŝvejk, kun kiu li eltrinkis la sekvan botelon. Ilia interparolo parte koncernis personan rilaton de la soldatpastro al virinoj kaj kartoj.

Ili sidis longe. Eĉ vespere persistis Ŝvejk kaj la soldatpastro en amika kunestado.

Sed nokte la proporcio ŝanĝiĝis. La soldatpastro regresis la hieraŭan staton, intermiksis Ŝvejkon kun iu alia kaj diris al li: Nepre ne foriru, ĉu vi rememoras tiun rufan kadeton en la trajno?

Ĉi idilio daŭris ĝis kiam Ŝvejk diris al la soldatpastro: Al mi jam sufiĉe pri tio: nun ci rampos la liton kaj dormaĉos, klare? !

– Mi rampas, karulo, rampas, ĉu ne evidente – balbutis la soldatpastro –, ĉu vi memoras, ke ni frekventis kune la kvinan klason kaj ke mi skribis viajn taskojn el la greka? Via familio havas vilaon en Zbraslav. Kaj vi povas veturi per vaporŝipo sur Vultavo. Ĉu vi scias, kio estas Vultavo?

Ŝvejk devigis lin senŝuiĝi kaj senvestiĝi. La soldatpastro obeis kun protesto al nekonataj personoj.

– Vi vidas, sinjoroj – li parolis al la ŝranko kaj la fikuso –, kiel min traktas miaj parencoj. Mi ne konas parencojn – subitis li decide, enlitiĝante. – Eĉ se la ĉielo kaj tero konspirus kontraŭ mi, mi ne konas ilin.

Kaj tra la ĉambro jam eĥis sola ronkado de la soldatpastro.

El la ĉeĥa: Oldřich *Knĭchal*



Monda turismo

Turismo estas la dua plej granda enspezfonto de la mondo. Laŭ la internaciaj turismaj statistikoj en la lastaj jaroj ĉ. 250 milionoj da turistoj forlasis sian hejmon por konatiĝi kun nekonataj partoj de la terglobo. Vojaĝagentejoj, hoteloj, restoracioj,ktp. servas la turistojn kontraŭ profitdonaj prezoj. Tamen por interkonatiĝi kun la loĝantaro de la vizitata lando, la turisto frontas grandajn malfacilaĵojn, ne konante la lingvon de la koncerna lando. Ne estas mirinde, ke la parolantoj de Esperanto volas kaj povas utiligi la internacian lingvon plej ofte por turismaj celoj. Jam la unuan Kongreson de Esperanto (1905) antaŭis vojaĝoj de nov aj esperantistoj komence pro scivolemo, sed kun konstatinda sukceso. Tamen devis pasi jardekoj, kiam en Vieno en la jaro 1970 je la iniciato de s-ro Eric *Carlen* fondiĝis Internacia Asocio MONDA TURISMO (MT), kunlaboranta kun UEA. Ĝia celo estas vastigi la Esperanto-turismon kaj enkonduki Esperanton en la internacian turismon. Konsentinde pri la graveco de la celo, aliĝis kaj kunlaboras en MT ĉ. 11 mil esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj komprenis la avantaĝon de la kunlaboro.

21 landaj reprezentantoj

La oficiala bulteno de MT „Esperanto-Turismo" redaktita en Bruselo informas la aktivulojn pri la atingoj, planoj alvokante la atenton por pli vasta kunagado. La nombro de landaj reprezentantoj de jaro al jaro kreskas. En 1982 ili estis 21. MT kunlaboras kun la turismaj sekcioj (komisionoj) de landaj Asocioj por la enkonduko de Esperanto en la turismon.

Ĉiujare estas anoncita konkurso pri diversaj temoj rilatantaj la efektivigon de la celo. Senpagaj partoprenoj en Esperanto-aranĝoj estas aljuĝitaj inter la konkursintoj.

Por la vastigo de Esperanto-turismo MT redaktas kaj eldonas ĉiujare Turisma Esperanto-Kalendaron kun la plej gravaj indikoj de Esperanto-renkontoj, ferioj, kongresoj en la tuta mondo. La redaktoroj, konsistantaj el la internacia estraro de MT kaj Turisma Servo de TEJO, volonte publikigas E-renkontojn pri kiuj la organizantoj ĝis la 30-a de septembro informas la redaktejon (PL–85 094 Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10.). La konantoj de tiu ĉi kalendaro volonte konsultas ĝin por plani sian libertempon. La popularеco de la Kalendaro de jaro al jaro kreskas, ja en ĝi troviĝas sortimento de 400 E-aranĝoj.

MT okazigas aŭtune Internacian Foiron de Esperanto-Turismo kun la partopreno de ofertantoj de diversaj E-aranĝoj. Ĉi tie eblas fari interkonsenton kun diverslandaj ofertintoj por certigi partoprenantojn unuflanke, ebligi al esperantistoj partoprenon en eksterlandaj aranĝoj aliflanke. Daŭre plifortiĝas la interesiĝo pri la Foiro flanke de turismaj burooj, kiuj jam akceptis la organizadon de grupoj por Esperanto-aranĝoj kaj dungas grup-

Sikonda – ofta turista celo en sudo de Hungario (Foto de Z. Fejér)



gvidantojn, ĉiĉeronojn, aferistojn parolantajn Esperante.

Ĉu timi krokodilojn?

Por vastigi Esperanton kaj ne fermi la E-aranĝojn antaŭ neesperantistoj, multaj renkontoj jam enprogramigis, je la rekomenda iniciato de MT, ĉiutagajn Esperanto-kursojn. Laŭ spertoj tiujn volonte kaj scivoleme partoprenas ne nur komencantoj, sed ankaŭ instruantoj kaj parolantoj de Esperanto eĉ dum la feriaj tagoj. Ekzistas jam eblaj ekzemploj pri novaj agemaj esperantistoj, kiuj ekinteresiĝis ĝuste dum E-aranĝo. Oni proponas al esperantistoj, ke ili ne timu pro „krokodiloj", ĉar tiuj iĝos esperantistoj se la kunferiantoj kondutas al ili konvinke. Ĉar la aŭtunan Internacian Foiron de Esperanto-Turismo ne povas partopreni amase interesiĝantoj, MT okazigas Foiron ankaŭ dum la Universalaj Kongresoj, tiam pri la venontjaraj aranĝoj.

Esperanto-kurson jam aranĝas vojaĝoficejoj por tiuj, kiuj partoprenos Esperanto-aranĝojn eksterlande. Estas eldonitaj broŝuroj pri Esperanto-kursoj kaj vortaretoj por turistoj. MT iniciatas la eldonon de samteksta turista konversacia kajereto adaptita en ĉiu lingvo. Belajn ekzemplojn por tio donis ESPERANTOTUR kaj Hungara Turisma Oficejo kun eldono de 50 mil ekzempleroj. La kajereto celas prepari la turistojn por ellerni en Esperanto la plej necesajn demandojn, kiujn necesos en la vizitota lando. Samtempe la samtekstan kajereton (en sia nacia lingvo) ricevu laboruloj de la internacia turismo por utiligi la frazaron de la „turista konversacio".

La grupaj vojaĝoj postulas spertajn gvidantojn kaj ĉiĉeronojn, kiuj parolas Esperante. Ankaŭ tiaj kursoj estas gvidataj, laŭ la iniciato de MT, en pluraj landoj. Spertaj E-ĉiĉeronoj ankaŭ dum la universalaj kongresoj estas bezonataj, por gvidi ekskursojn – ĉiujare en alia lando.

Taskoj post Manilo

Por enkonduki Esperanton en la turismon – grave subtenis la agadon de MT la Deklaro de Manilo (en 1980) pri kiu detale raportis la Esperanto-gazetaro. Esperanto povus atingi pli da sukceso sur tiu ĉi tereno per la serioza kunlaboro kaj interveno de Landaj Asocioj. Ĉiuj landaj Turismaj Organizoj partoprenontaj la sekvontajn konferencojn de Monda Turisma Organizo (WTO) devos esti informitaj pri la avantaĝoj de Esperanto en la internacia turismo.

MT atingas sukceson, kiam profesiaj turismaj agentejoj uzas: aplikas Esperanton. Kaj tio jam ne estas malofta afero.

Elizabeta *Pallós*

Turistoj en la pitoreska urbo Szentendre

Konkurso de Monda Turismo

Espereble vi jam havis okazon partopreni en Esperanto-turismo aŭ en poresperantistaj renkontoj. Do ne estu maldiligenta kaj prenu paperon por rakonti pri tio, kaj vi jam partoprenas en nia konkurso. Per tio vi donos al ni utilajn informojn, prijuĝojn, seriozan kritikon kaj ne lastfoje vi povos gajni senpagan partoprenon en iu el la subaj internaciaj Esperanto-renkontoj en 1984. Kaj se vi emas plenumi pliajn punktojn de nia konkurso, vi grave kontribuas al la informado por ni tre bezonata. Bonvolu ne heziti kaj prilabori almenaŭ unu el inter 4 temoj.

1. **Sincera pritakso de Esperanto-aranĝoj (minimume 1-paĝa)**
2. **Priskribo de naturbelaĵoj kaptintaj vian atenton, plaĉon dum ekskursoj en la jaro 1983. Vi povos prezenti tion kaj proze kaj verse**
3. **Sendu al ni eltranĉitajn artikolojn pri Esperanto-turismo el vialanda gazetaro – kun traduko**
4. **Pri la supraj temoj vi rajtas sendi fotojn, lumbildojn.**

Vian konkursaĵon bonvolu sendi al la vicprezidanto de MONDA TURISMO s-ino Elizabeta Pallós (Pécs, Ybl Miklós u. 9. I/2 H-7633)

ĝis la 30-a de septembro 1983.

Jen la premioj:

- **po unusemajna restado en Finnlando, Bulgario, Svedio, Turkio, Benelukso**
- **partopreno en SIA '84 en Pécs (Hungario)**
- **partopreno en „Tagoj de Bydgoszcz" (Pollando)**
- **partopreno en „Turisma Semajno" (Slovakio)**
- **partopreno en „Zamenhof Internacia Pacmarŝo" Zebegény (Hungario)**
- **partopreno en 17-a Internacia Renkonto Naturmaika Abaliget (Hung.)**
- **partopreno en 13-a Vintra Esperantista Ferio – Budapest**
- **partopreno en la Internacia Esperanto-Kursejo – Pisanica (Bulgario).**

* *

Ni informas vin, ke en la Konkurso 1982 jenaj partoprenintoj ricevis premion:

1. S-ro Peter Vukov (Kaposvár) por Benelukso; 2. s-ro Barnabás Batta (Miskolc) por Svedio; 3. s-ino Katarina Faragó (Hódmezővásárhely) por Finnlando; 4. s-ino Marjatta Linjama (Jyväskylä) por Pollando; 5. s-ino Ziuta Dolgoska (Szczecin) por Benelukso; 6. s-ro Jozefo Kaptay (Tatabánya) por Pollando; 7. s-ino Maria Kovács (Hódmezővásárhely) por Pollando kaj 8. s-ino Janina Trokieleicz (Tlukomy) por Budapest.

APLIKEBLO

En mezaj kaj grandaj produktejoj de sukeraĵoj ĝi uzeblas por prilaborado de diversaj materialoj (ŝaŭmoj, kremoj, pastoj). Per komplementaj maŝinoj (aldonaj akcesoraĵoj) kroĉeblas al la ĉefa maŝino, estas plenumeblas ankaŭ aliaj laboroj (tranĉado, muelado, kaĉigo ktp.)



TEKNIKA PRISKRIBO

La maŝino estas konstruita sur bazo farita el ŝtala lameno, fiksebla al solida fundamento. Al la bazo kroĉiĝas maŝinstablo veldita el lamenoj. Ĉe la fronta flanko de la maŝinstablo troveblas la kaldrontenilo kaj la motorujo, en kiu estas lokitaj la dentoradoj kaj akcoj necesaj por la kvar funkcigradoj. Al la rotaciianta akso simple munteblas kirliloj de tri specoj. La kaldrono (de 40 aŭ 60 litroj) estas levebla per 2 leviloj ĝis la dezirata alto, kaj ĝi estas fiksebla al la kaldrontenilo. Ĉe la fronta flanko de la motorujo troviĝas la kroĉilo por la almuntado de komplementaj maŝinoj. Al tiu ĉi sama kroĉilo munteblas ajna komplementa maŝino.

TEKNIKAJ INDIKOJ

Longo	760 mm
Larĝo	560 mm
Alto	1135 mm
Pezo ĉ.	300 kg
Elektraj indikoj	1,5 kW, 3+N 50 Hz, 380 V
Plenumkapablo:	por la kirlado de 7-8 litroj da kremo necesas 25 minutoj

KOMPLEMENTAJ MAŜINOJ, KROĈEBLAJ AL LA ĈEFA MAŜINO

- H-82 viandomuela komplementa maŝino
- F-10 spicomuela komplementa maŝino
- M-20 papavomuela komplementa maŝino
- MH-82-4/1 tranĉil-akriga komplementa maŝino
- MH-82-6/1 tranĉil-puriga komplementa maŝino
- KK-100-1/5 universala distranĉa komplementa maŝino

KERIPAR

Produktas: KERIPAR Entrepreno Produktanta Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco
Komerca Direkcio: Budapest V. Bajcsy-Zs. út 72.
Telefono: 313–124
Telekso: 22–6237
Eksportas: Transelektro

Malfermita letero pri proza tradukado

Tre estimata Samideano,

akceptu denove dankon de H.V. por via propono: omaĝe al la granda verkisto publikigi iom da viaj tradukaĵoj. Nun ni respondas viajn riproĉojn, kial kaj kiel la redaktora rugkrajono ŝanĝis plurloke viajn E-vortojn, foje eĉ originalajn esprimojn.

Kial, laŭ kiuj principoj okazis la ŝanĝoj? – incitite vi demandas. La ŝanĝojn ni ne kontestas: kvankam ege malvolonte, la redakcio sentis fortan devigon ofte grave korekti la tradukaĵon. Kredu al ni: tian taskon surpreni estas vere malagrabla afero. Korekti dum longaj horoj nepropran tradukaĵon, multe cerbumi pro malklaraj frazetoj, serĉi pli reliefigajn esprimojn... Estus multe pli facile lasi la tekston senŝanĝe. Sed... la redakcion orientas la intereso de la legantoj! *kaj tiu* leĝo *postulas klaran lingvaĵon, kompreneblan sencon, en H.V. eĉ* internacian kompreneblecon, *kion – memkompreneble – la aŭtoro siatempe ne celis. Por alilingva publikigo certe ĥi mem ĝustigus siajn „enlandajn" esprimojn en tiuj ĉi kritikaj-skizaj rimarkoj, spritaj-brilaj notoj. Ne forgesu: ne temas pri netuŝeblaj klasikaĵoj, sed pri artikoloj, kies direndon oni devas sence-pense plej bone komuniki* al alilandanoj. *Restis tial la sola eblo: fari korektadon kaj indiki per la subskribo: (Laŭ traduko de R. Š."), ke ĝi* ne tute *devenis de vi...*

Prave skribis William Auld: tradukado estas trukado – *ja iamaniere tion bezonas la transigo en* alian *lingvon, kiu konsistas ne nur el aliaj vortoj! Ĝi havas alian strukturon, kiu elradias aliajn nuancojn kaj vekas alispecajn sentojn. Tiu kiu iam provis rakonti ŝercon alilingve al fremduloj, devis sperti la malsamajn emfazojn pro la malsama gramatiko, ofte eĉ la malaperintan humurecon de la (originale) bona ŝerco. Kiam vi fieras – sendube prave – pri „fidela, aŭtentika" tradukado, vi per tio manifestas, ke – kvankam senintence – vi misagis foje kontraŭ la ĝusta komuniko de la aŭtoraj pensoj: pro la laŭlitera traduko! Tiu maniero estas la malamiko de la bona tradukado, al kiu ajn lingvo.*

Sed tiu malamiko trovas bedaŭrinde pli multajn aliancanojn inter esperantistoj ol inter tradukantoj al etnaj lingvoj. Al multaj ŝajnas, ke nia mirinda lingvo havanta egajn internajn kapablojn por formi vortojn, provi formojn, estas laŭplaĉe manipulebla kaj uzebla kvazaŭ tradukmaŝino. Oni enigu la frazojn, ties vortojn de sia lingvo en tiun „tradukmaŝinon", kaj tra la E-vortaro elvenas la Ea teksto, vorto post vorto. Feliĉe, ja oni ne devas ŝvite lerni multege da specialaj esprimoj, dirmanieroj, devigaj kunligoj de vortoj, kion postulas la franca aŭ la rusa kaj aliaj lernataj lingvoj. Kvazaŭ E-lingve oni povus reprodukti iun ajn etnolingvan esprimon, neglektante, ĉu alilandanoj povos ĝin identigi per sia malsama pensmaniero. Hungaro ekzemple „serĉas monon", franco „gajnas sian vivon", ktp., tamen internacilingve ni „perlaboras monon". Tiu ŝajnas tradukmaŝinkaraktero de Eo kontribuas plej versajne al la konata, amasa inklino forĝi kaj traduki poemojn...

Centra principo de la tradukado (ankaŭ en prozo): NE VORTOJN TRADUKI, SED LA FRAZON, LA PENSON! Kaj la „trukado" estas: post pripenso kaj taŭga modifo transplanti la frazon, ĉar nur tiel eblas konservi la direndon de la originalo. Ni prenu la titolon de la originala verko laŭ via traduko: „Panoramo de rigardoj..." Ĉu vere „de rigardoj"? Ni konjektis: „de pbservoj". Nun vi klarigis, ke temas pri „mondrigardoj"; jen, Eo distingas *inter la du nocioj (la etnolingvo ne tiel klare), la „fidela" traduko do iĝis mistraduko. Similmaniere multaj „aŭtentikaj" tradukfrazoj iĝis malklaraj, eĉ nekompreneblaj. Travideblas la nacia esprimado, kio malhelpas al eksterlandanoj kompreni la aŭtoron. La bedaŭrindaj ne-ekvivalentoj en Eo, la malĝusta vortordo (imito de la nacia) pro la vortsekvema, de-vort-al-vorta tradukmaniero tute maltrafis. „El perfida incendio alten torente elfetiĝas brulantaj fajrosplitoj" ni legis foje. Tro longaj vortkunmetoj bremsas la elokventecon de tiu retorika figuro: eble la lastajn vortojn akcelas traduko per „flamaj sparkoj", sed dubinde ĉu indencio perfidas (?) kaj torento fluas alten? El la buntaj nacilingvaj vortsinsekvoj, foje rimantaj aŭ ludaj, la tradukanto malfacile kaj pene devas* krei, *ion novan, adaptitan al la cellingvo per konvenaj vortoj, ne nepre „identaj".*

Tradukanto devas pesi ankaŭ la stilelementojn, *ĉu kaj kiamaniere ili estas transplanteblaj. Apenaŭ necesas insisti pri tiu bezono: alie aspektas stilo kun prepozicioj, ol tiu kun afiksoj, ankaŭ se deklinacio uzeblas,* depende *de la karaktero de la lingvo. La unua iom longemas, la alia koncizemas, sekve iliaj stilaj efektoj grave diferencas. La originalan stilon konservi eblas nur malofte, ĝuste pro la diversaj lingvo-karakteroj, sed ne maleblas trovi stilefektojn en la cellingvo (vidu la majstrafojn en Ŝekspir-tradukaĵoj), kiuj „anstataŭos" la originalan stilefekton per alia oportuna.*

Iom pri la internacieco. La tradukanto devas bone konscii, ke internacia publiko ne multe komprenos enlande konatajn historiajn aŭ geografiajn aludojn. „Antaŭmarta generacio", „tranĉita Hunujo", „kajzermanovro" kaj multajn similajn, eble (?) konatajn en Meza Eŭropo, norvegoj aŭ litvanoj ne komprenos! Fojfoje helpas gloso, piednoto, sed ĉiupaŝe certe ne. Ne estas falsigo, eĉ male, se tradukanto transformas tiaspecajn aludojn, ekz., tiel: „antaŭrevolucia generacio", „stab-manovro", aŭ anstataŭas Hunujon per „Hungario de la sinjoroj", ĉar tiuj esprimoj, eble malpli elokvente, sed por ĉiuj legantoj spegulas la ideon de la aŭtoro. Nenia „fideleco" donas rajton al la tradukanto kaŝi la esencan direndon de la aŭtoro malantaŭ terminoj kaj esprimoj nekonataj al la celita publiko! Li devas iri suben de sia alta turo, kaj kompreneble, klare paroli „al la tuta mondo" se li ekparolis la Internacian Lingvon. Certaj perdoj de la originalaj aromoj estas neeviteblaj, li devas ne bedaŭri ilin, sed traduki des pli inventeme, ankaŭ kuraĝe forlasi neklarigeblan frazon. Por siaj samnacianoj la aŭtoro donis hungarajn kolorojn per kelkaj, tie al ili konataj hungaraj vortoj (Paprika Janĉi, katona, varmedje, Erdelj – fonetike). Sed vane tiuj aperas en la tradukaĵo kiel „katonoj" k.s.; eksterlande, tra Eŭropo kaj la mondo ili ne prezentos hungaran aromon, sole nebulajn fremdvortojn, eble surprizajn„neologismojn", denove sensence.

Kredu al ni, estimata samideano, ke okazis intenca plibonigo kaj reliefigo de la aŭtoraj ideoj dum la korektado, kiun ni nepre devis fari. Ties motivojn mi klopodis skizi en la supra letero.

Sincere Via
Ervin Fenyvesi

GAJA PAĜO

Postulemulo

Ili – pardonu: ŝi–li – divorcas. Demandon de la juĝisto pri la kaŭzo la edzo tiel respondas:

– Kiam ajn mi hejmeniris, ĉiam mi trovis fremdulon en la ŝranko.

– Do tial vi decidis eksedziĝi?

– Kompreneble, s-ro juĝisto. Ankaŭ vi farus same, se vi neniam trovas lokon por pendigi vian mantelon.

La manio de Manjo

– Estimata psikiatro! Mi venis pro mia edzineto Manjo. Imagu, ŝi havas lastatempe la manion, ke iu volas ŝteli ŝiajn robojn.

– Ĉu vi vere konvinkiĝis pri tio?

– Eĉ ŝia manio kreskis jam tiagrade, ke ŝi dungis spertan garderobiston por gardi la robojn. Hieraŭ mi malkovris lin en la ŝranko...

Nek manio, nek ŝerco

– Peĉjo, mia amiko! Mi estas tiom enamiĝinta... kaj tial ege trista!

– Tamen kial Karlo?

– Tial, ĉar mi ankoraŭ ne scias al kiu mi enamiĝis...

Lasu la temon «amafero»!

Bone! Sed unue bonvolu depreni – diris gaje-vete veterana edzo – mian geedzan ringon, ĝin mi sentas *ama fero...*

Vera kamaradeco

montriĝas, kiam la maristo – aŭdante krion, ke homo falis en la maron – tuj subigas la flagon ĝis la mastomezo.

Elektristo

estas homo, kiu deziras ligi kontaktojn ne kurantajn, sed kurentajn.

La fama avarulo

legas vespere en la ĉambro, sed ĉiuminute li ekstaras, kaj saltas al la elektra ŝaltilo: jen malŝaltas la lumon, jen ree ŝaltas ĝin.

– Kion vi faras? – miras la edzino.

– Foliumi mi kapablas ankaŭ en mallumo – venas la respondo.

Fremdiĝo

– Mia edzineto ŝajnas nuntempe tiel fremda al mi! Kaj mi estas bona kaj brava edzo, kiu ne kutimas kisi fremdan virinon...

Anekdotoj pri Mulao Nasreddin

(El kolekto de Jekaterina B. Mamedova, Bakuo)

Nokte, vekita pro ploro de l' etulo, la edzino de Nasreddin riproĉis la mulaon:

– Estas ja nia komuna infano, duone via, duone mia. Ellitiĝu almenaŭ unufoje, kaj trankviligu la infanon!

Kaŝante sin ĝiskape en la kovrilon, la mulao eligis:

– Trankviligu nur vian parton, sed la mia restu ploranta!

Nasreddin edzinigis junan vidvinon, kiu post semajno naskis filon. La konsternita mulao iris al la bazaro, aĉetis kajerojn, paperojn kaj skribilojn. Li metis ilin en saketon de lernejanoj, kaj ligis ĝin al la liteto de la etulo.

– Aj, mulao, kion vi faras? – demandis la najbarinoj.

– Se naŭmonatan vojon li trairis dum semajno, evidente post monato li vizitos jam lernejon. Do ĉio estu jam preparita.

Kien vi kaŝis la esperantaĵojn?



Li pagis kotizojn al dek Esperantaj organizaĵoj

Libro nepre rekomendinda

Baza Literatura Krestomatio. Redaktis: Vilmos Benczik. Dua, ampleksigita eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1982. 282 p. 19 cm. ISBN 963 571 095. Prezo: 13,80 ned.gld.

En sia eta aldona enkonduko al la dua eldono la redaktoro informas nin, ke la tuta unua eldonkvanto, kiu aperis samloke en 1979, ĉiuj 3500 ekzempleroj (certe ne „ekzemploj", kiel estas misskribita sur la paĝo 6) „forvendiĝis dum nur du jaroj". Sufiĉe elokventa fakto, kiu pruvas la grandan intereson al la E-literaturo.

Ĉi-foje sub unu tegmento pace ekloĝis 59 aŭtoroj – poetoj, prozistoj, tradukistoj de diversaj generacioj: de grandeguloj-korifeoj (L. Zamenhof, A. Grabowski, K. Kalocsay, J. Baghy, E. Privat) kaj niaj nuntempaj E-famuloj (William Auld, Marjorie Boulton) ĝis tute junaj novaj steloj sur la literatura E-firmamento, kiel Maŭro Nervi k.a.

Ne nur kolego-redaktoro povas imagi, kiom multe da laboro peniga kaj skrupula postulis la kompilado kaj redaktado de ĉi volumo (mi nun parolas ĉefe pri la unua eldono, ĉar la bazo estis fakte nešanĝita: la tekstoj de la dua eldono estas ampleksigitaj nur je 26 paĝoj, do ĉ. je dekono. Sed en tiu dekono (krom tri novaj nomoj – la reprezentantoj de pli juna generacio de la naturdotitaj E-aŭtoroj: talenta itala junulo 23-jara Maŭro Nervi kaj la ĉeĥo Oldřich Knĺchal) estas io, kio ege altigas la valoron de la libro: en la fino aperis 25-paĝa aldono – la koncizaj biografioj de la aŭtoroj. Por ĉiu el ili estas dediĉitaj de 2-3 ĝis 20-29 linioj, depende de la rolo kaj loko de la verkisto en E-literaturo.

Memkompreneble, en tio, same kiel en la elektado de la aŭtoroj, respeguliĝas ankaŭ la „subjektivaj preferoj", pri kiuj oni povas iom disputi, sufloranteal la redaktinto ankoraŭ iujn nomojn, ial forgesitaj aŭ preterlasitaj. Sed entute la elekto ne elvokas seriozajn refutojn, la elektinto estis sufiĉe (iam eĉ tro) postulema kaj rigora. Jen la argumento: el 24 poetoj kaj tradukistoj, por kiuj troviĝis loko en la plej unua tiaspeca antologieto „La Liro de la Esperantistoj (Nürnberg, 1893), nur tri eniris la recenzatan krestomation: Zamenhof, Grabowski, Devjatnin. Kaj ĉu la alia dudeko de flamantaj iam fervoraj E-pioniroj sur la verda kultura kampo jam poreterne dronu en Leteo? Inter ili ja estis tiaj konataj nomoj kiel Belmont, Dambrauskas-Dombrowski, Feliks Zamenhof k.a.

Mirigis min ankaŭ, ke en „Baza Literatura Krestomatio" mi ne trovis la nomon kaj kelkajn belajn poeziaĵojn de la fama bulgara E-veterano kaj talenta poeto, tradukisto Asen Grigorov, kiu en ĉi tiu jaro festos sian 80-jariĝon kaj kies altnivela kaj aktuala poemaro „Gardu la Pacon! " (Budapest, 1980) aperis ĉe la sama eldonejo, kun la sama respondeca redaktoro.

Ankoraŭ io okulfrapis min, kiam mi trafoliumadis kaj legis la krestomation – kvazaŭ iaspeca diskriminacio kontraŭ virinoj, tute malmoderna en nia emancipita epoko. Juĝu la leganto mem: el 59 aŭtoroj – nur kvin virinoj! (Hilda Dresen, Marjorie Boulton, Clelia Conterno, Eli Urbanová kaj Eva Tófalvi). Ĉu vere en Esperantujo oni ne povis trovi pli da naturdotitaj verkemulinoj, kiuj postlasis bonan spuron en la E-literaturo, kiel ekzemple, Lina Gabrielli (Italio), Rajna Konstantinova (Bulgario), Ludmila Jevsejeva, Elvira Lippe (ambaŭ el Latvio), Inita Tamošiuniene (Litovio), Dina Lukjanec (el Rusio, Siberio)? Tiun ĉi nomaron, oni povus verŝajne pligrandigi.

Por ke oni ne akuzu min en la troa virina subjektiveco, mi aldonu, ke nejuste, laŭ mi, estis preterlasitaj tie ĉi miaj famaj E-samlandanoj (viroj): V. Eroŝenko, G. Deŝkin, A. Liljer-Logvin. Sed, kiel diras la saĝa proverbo: „Pri gustoj oni disputi ne devas."

Do por la konkludo mi volas sincere gratuli la estontajn legantojn okaze de la reapero de ĉi tre utila kaj valora libro – bonega helpilo-akompananto de „Gvidlibro por Supera Ekzameno" – al la studantoj de E-beletro, kiuj intencas pliprofundigi siajn konojn ne nur en la historio de E-movado kaj kulturo, sed bone orientiĝi en la E-literaturo mem, ĉar la recenzata „Baza Literatura Krestomatio" tre bone servas al tiu celo, konatigante ilin kun la apartaj verkoj kaj aŭtoroj, specimene prezentitaj en ĝi, donante pli-malpli plenan „superrigardon pri la tuto de nia literaturo".

La libro nepre rekomendida por ĉiu fervora esperantisto!

Nadia *Andrianova*

Noveloj por diferencaj gustoj

Lappar, la antikristo. Endre Tóth (1931–1981). Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 139 p. 18 cm. ISBN 963 571 048 8. Prezo: 13,80 gld

Juvelo plej fajna estas la novelo „Lappar, la antikristo". „Ili vagadis ĉiam kune, kvarope. Ili estis nek pli, nek malpli bravaj, ol la ceteraj bubaĉoj de tiu epoko." Temas pri kelkaj horoj da petolaĵoj de tiuj kvar – kaj kiel ili fariĝas tri. La rakonto teruras kaj pensigas pri la rilato inter „bubaĉaj" fantazioj kaj la abomenaĵoj, kiujn poste kapablas tiuj samaj, „maturiĝintaj". Jen novelo inda je la plumo de Roald Dahl, Stanley Ellin, Stephen King – se mencii nur kelkajn el la plej sukcesaj verkistoj anglalingvaj.

„Lappar" gajnis la unuan premion en la proza kategorio de Belartaj Konkursoj en 1976. Du aliajn ĉeestantojn ĉi-kolektajn distingis BK-premio: „Aŭtune" (tria, 1974) kaj „La murdita juglandarbo" (dua, 1976). Estas interese, ke ĝuste tiuj estas inter la plej, kiel diri, alireblaj noveloj de Tóth, kun „Pordoj" kaj „Tata Ben". Ĉi tiuj estas rakontoj tute kompreneblaj, eventuale kun pli ol unu nivelo de signifo, sed unuavice kun surfaca intrigo jam rekte ĝuebla.

Ne ĉiuj el la dek kvin pecoj estas tiaj. Aliaj verŝajne ne baldaŭ eniros legolibron aŭ antologion. Kio diable okazas, demandos multaj, en „Sinjoro Don"? Kio estas tiu dubuša dentopastujo? Fakte tio estas relative travidebla simbolo, sed kio pri la „Groto" de la posta novelo? Ĉu ĝi reprezentas la homan cerbon/menson, la historion, la universon...? Ĉi tian novelon povus verki ne Roald Dahl, sed eble Jorge Luis Borges.

„La vojperdinta biciklisto" komencešajnas tute komprenebla humuraĵo pri klopodoj ricevi instrukciojn, kiel atingi stacidomon. Sed Tóth subite nin surprizas, tirante sian protagoniston en mondon košmare kafkeskan. En „La tabakvendisto", la nomito restas en urbo, kiun fuĝas ĉiuj aliaj pro... pro kio? Tóth ne diras. Evidente tio ne gravas por lia celo.

Por la meza leganto, ĉi kolekto valoras sian prezon jam nur pro la titola novelo. Por tiu malplimulto, kiu volonte iom strečas la menson če fikcio malpli facile digestebla (sed ne pro tio malpli valora), la tuto meritas atenton. Ni bedaŭru la tro fruan forpason de Tôth, sed danku la sorton, ke li postlasis sufiĉe da noveloj por konsistigi ĉi tiun volumon, kiu elskulptas por li niĉon en la galerio de la hungaraj esperantaj novelmajstroj, apud Baghy, Szilágyi kaj Szathmári.

Karl *Pov*

*

Ne nur por lernantoj

Bernard Golden: Marĝene de la lernolibro. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto, 1982. 58 p. 20 cm. ISBN 963 571 083 6. Prezo: 6,60 gld.

Antaŭ nelonge mi havis la okazon revizii artikolon, en kiu la aŭtoro, longjara movadano, provadis ekspliki uzon de paronimo, kies signifon li atribuis al la alia. Sekve, lia klopodo montriĝis ne nur vana, sed – konsiderante eventualan publikigon de tia prilingva „kurso" – eĉ kompromita.

Ĉi ekzemplon sugestas al mi kolekto da studaĵoj far B. Golden, parte jam konata al la legantoj de Budapeŝta Informilo kaj Hungara Vivo, kiu povas instigi ankaŭ rutinulojn revizii la propran supozatan lingvokonon. Jen, kelkaj titoloj: La problemo de paronimoj en Esperanto; Kion signifas „akcio"? , „Ordi" aŭ „ordigi"? , Spegulvortoj en Esperanto; Traduttore – traditore...

Preskaŭ en ĉiuj siaj analizoj la verkinto priatentas artikolojn de la hungareparolantaj esperantistoj, abunde citante el ili, ĉu koncerne transskribon de propraj nomoj, tradukadon aŭ stilon. Tamen, krom helpi eviti hungarismojn speciale, li konkludas ankaŭ pri naciismoj ĝenerale. (Vd. ekzemple la uzadon de „fronto" – „frunto").

El ĉiutaga praktiko mi ŝatus aldone listigi du specimenajn vortojn, kies (mis)interpreto estas tipa por la hungareparolantoj. Temas pri „eredmény" kaj „gond" uzataj *duope,* en kiu rilato oni kutime elhungarigas ilin (ne nur Esperanten) kiel „rezulto" kaj „zorgo" anstataŭ „sukceso" kaj „problemo", (ekz. en la frazo „Niaj sukcesoj kaj problemoj.").

La angleparolantan aŭtoron evidente ŝokas neadekvata „uzo de la angla en Esperanto" (tiel titoligas la respektiva studaĵo. Al mi ŝajnas, ke unusencaj prijuĝo aŭ decido ne atingeblas. En pluraj, malpli disvastigitaj etnolingvoj, precipe en sciencaj verkoj, okazas, ke oni glosas fakterminon fremdlingve por eviti miskomprenon, alifoje kolorigas la tekston per pruntepreníta esprimo – sen koncedi per tio „malsuperecon" de sia gepatra idiomo.

„Marĝene de la lernolibro" estas rekomendinda ne nur al lernantoj, sed al ĉiuj, kiuj deziras paroli kaj skribi en Esperanto pli ĝuste kaj pli internacie. Stilsuka verketo faciligos plenumi tiun laŭdindan ambicion.

O. *Knĩchal*

*

Ne mankas bonaj pecoj

La naŭa kanalo. István Nemere (1944-). Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 105 p. 20 cm. ISBN 963 571 037 2. Prezo: 13,80 gld.

Kvankam li ankoraŭ ne havas grandan famon en Esperantujo, István Nemere jam atingis, laŭ raportoj, kontentigan sukceson per noveloj kaj romanoj en la gepatra lingvo, la hungara. Li estas fekunda, metia fikciisto, kaj de tio devenas kaj fortaĵoj kaj malfortaĵoj de tiu ĉi kolekto.

Ĝi ofertas ĉefe noveletojn – verkojn de ĝis ses paĝoj, ofte de unu aŭ du. Nur la titola rakonto iom longas, kun pli ol dudek paĝoj. Tio faras la libron tre taŭga por progresiga Esperanto-kurso, aŭ simple por relative freŝbakita esperantisto, kiu helpe de vortaro povus travori grandan parton de la novelaro po mordetoj, kvazaŭ pufmaizon. Ĝuste la plej mallongaj pecoj – nomu ilin skizoj, anekdotoj – ofte plej plaĉis al mi.

Pri pluraj el la pli longaj, precipe la fantasciencaj, mi spertis malpli da ĝuo. Tio eble rilatas al tio, ke similajn mi jam abundege legis en la angla. Malofte sukcesas rakonto dependa de surpriza fino, se tiu fino ne vere surprizas, kaj centojn da tiaj „surprizoj" jam de longe eluzis ĝis ĉifonoj la usona ĝenra novelo. Sekve min lasis indiferenta „Ne doloros", „Duobla kaptilo", „Miaj manoj neniam tremas" kaj aliaj. Verŝajne ilin ĝuus legantoj malpli legintaj, kaj en Esperantujo ne konvenas surkraĉi tian valoron, eĉ se limigitan. „La naŭa kanalo", kvankam simile kliŝa, iomete pli sukcesas pro prilaboro de la roluloj.

Apartan malŝaton mi havis por „La Mesio en Greentown", ironiaĵo pri reveno de Kristo kiel portorikano al usona urbeto. Kial do tiel? Kial ne temu, ekzemple, pri Kristo turka aŭ cigana en Hungario? Ni usonanoj kapablas moki nin mem laŭbezone, kaj iom ofendas, kiam eksterlandano kvazaŭ predikas al ni de alte. Tio ne ĝenas en ekz. „La barbaro" de Szathmári, kiu efektive enhavis elementojn el la historio nordamerika, sed če ĉi tiu fabelo mi trovis nenion por nepre motivi usonecon.

Mi tamen ne finu per negativaĵoj. Ne mankas tre bonaj pecoj inter la tridek unu ĉi tie kolektitaj, ankaŭ el la longetaj: „Retuŝo", „Fantomo" kaj „La mistera fremdulo" meritas atenton, kaj igos min kaj aliajn atenti venontajn titolojn de István Nemere.

Karl *Pov*

Amikeco

Ni citas epigramon de *Ovidio* el la antologio de *Grabowski:* „El parnaso de popoloj". Kiel solvon alsendu la epigramon de la linioj **H.1., 55.** kaj **V.15.**
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: 15. Iun signus **16.** Kredeme **17.** Fluidaĵo en buŝo (R) **18.** Sola en sia speco (R) **19.** Ekigas procezojn ĉe aliaj organikaj substancoj (R) **21.** Ridindigi iun **22.** Buŝaĵo de birdoj (R) **23.** Botel-fermilo **24.** Vulkana ŝtonaĵo (R) **26.** Adverbo **27.** Verba finaĵo **28.** Kunvenigi multajn **29.** Subita malfunkcio de motoro **31.** Interjekcio **32.** Koni kun certeco (R) **34.** Opera kanto (R) **35.** Kavi teron (R) **36.** Veldo-fino! **38.** Tre koloriga ruĝa substanco **40.** Kripla je kruro (R) **41.** Vetertuto de regiono (R) **43.** Lirika poemo **44.** Interrilatigi objektojn inter si **46.** Reen: flugilforma ekstremaĵo **47.** Eventuale **49.** Mara mamulo (R) **50.** Per decida, rapida movo **52.** Interjekcio por bedaŭro **53.** Valo en FRG, trovejo de prahomo **57.** Duono de skeleta ero **58.** Nian planedon **60.** Disrompi terbulojn (R) **61.** ...so: aldonaĵo al vortoj **62.** Cent – en slavaj lingvoj **64.** Aritmetikaĵo, „pluraj termoj" (R) **66.** Ne tro **67.** Optikan instrumenton **69.** Muzika son' **70.** Naftaĵo (R) **72.** Rivero en Sovetunio **73.** Parto de ina brusto (R) **74.** Kompenso de kulpo (R) **75.** Kurboparto (R) **76.** Daŭrigo de H.57. **78.** Sencele iradas **80.** Ankaŭ bambuoj estas tiuj **81.** Numeralo **82.** Inklino **84.** Tio estas, kiam la organoj normale funkcias (R) **85.** Konsultas sorton por ke ĝi decidu **86.** Malbonodora eta mambesto (R) **87.** Multe da sala akvo **89.** Asignos premiojn helpe de H.85. **91.** Donaco **92.** Apliki forton sur korpon **94.** Nederlanda verkisto (pri kontraŭfašisma rezistado, Theun de...) **95.** Purigos

Vertikale: 2. Rumandevena franca dramverkisto **3.** Intimulo (R) **4.** Sekreciaĵ' **5.** Verda Societo **6.** Fizika laborkapablo (R) **7.** Forigi herbaĉojn **8.** Sento de danĝero **9.** Novelointerno **10.** Pro korpa impreso oni... **11.** ...timata **12.** Kontraŭa (R) **13.** Instrumentoj **14.** Malprave ĝeni (R) **19.** Granda komerca kunveno **20.** Reen: mallonga rimarko (R) **23.** Aparato por ekfluigi **25.** Fama itala filmreĝisoro **29.** Lukse, brile **30.** Miksita dio **33.** Aparta de aliaj **35.** Granda konateco (R) **37.** Mezurunuo de elektra rezistanco **39.** Tute sama (R) **40.** Parto de spaco (R) **41.** Signo de parentezo (R) **42.** Kunfandi metalojn **44.** Floroparto, ententanta la seksajn organojn (R) **45.** Anonc' pri danĝero **48.** Animalo **49.** Metalon **51.** Distanco inter proksimuma kaj ekzakta valoroj (R) **54.** Konfidas al iu por gardi **56.** Kiel ŝafo sur altaro **59.** Per specialaj najloj metalojn... **60.** Elementa gas' sen komenclitero **63.** Regula situaci' **65.** Per ĝi oni signas iun (R) **66.** Havos enmane **68.** Antaŭe ne estinta (R) **70.** Juĝisto faras **71.** Honoriga distingilo **73.** Laŭcela armea moviĝo (R) **74.** Entuziasma esprimado de altaj pensoj **77.** Granda bongusta markrustulo **79.** Hepata sekreci' **80.** Astro kun vosto (R) **83.** Aŭdorgan' **85.** Li pagis por la hotelĉambro, kiun li... **86.** Translokigi **88.** Reen: korinklino **90.** Ege **91.** Reĝino en kartludo (R) **93.** Kvar – per romiaj ciferoj **95.** Artikolo

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1982/5: festival, Andreo, Konkordo, Rita, Makai, Miluo, Gulivero, panoramo, Mikes, ŝanco – filharmonio, neologo, lenso, aplik, amoro, manikon, amonio, rane. – Pro preseraroj ni petas vian indulgon.

Premion gajnis per lotumado: Osmo *Buller,* SF; Zbigniew *Lepieszkiewicz,* Koszalin, PL; Béla *Medgyes* kaj István *Ertl,* Budapeŝto, H. – „Gajnis", tamen ni devis neglekti la solvinton, kies adreso bedaŭrinde ne estis deĉifrebla. Estas afableco al la redaktoro, se vi *preslitere* skribas ĝin *sur la solvo mem.*



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La kato en la sako

„La kato en la sako" estas eta antologio, ĉar ĝi enhavas originalajn Esperantajn poemojn kaj rakontojn. Inter la nomoj de la aŭtoroj videblas niaj plej elstaraj verkistoj kiel Szathmári, Ĥoñlov, Auld k.a. La libreto ne nur agrable faciligas la lernadon de Esperanto, sed per ĝi la legantoj ekkonas la plej bonajn specimenojn de nia originala literaturo.

1. Kial Aleksandro, la ĉeffiguro de la rakonto „La meĉo brulas" ne sukcesis suprengrimpi el la puto?
2. Kian profesion havas la frato de avo Martin?
3. Kiu poemo finiĝas per la strofo:
   „Ho, vi vera bruto kampa
   vidu ĝin ĉe lumo lampa! "

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Korespondi deziras

Dentkuracistino Elzbieta *Kutkowska* (38) div. temoj, *Leszno* str. 55. Pulk Piechoty 25/6 PL–64-100. – F-ino Maria *Strózynska* (26) pri sporto, karateo, *Stare Bojanowo* Robaczyn 39, PL–64-040. – S-ro *Martynov* Vladimir (32) instruisto de germana, pĉt. *Perm,* ul. Krasnopoljanskaja 27 kv. 4. SU–614.062. – Instruistino f-ino J.D. *Augulytė* (26) ktm, pĉt, *Tauragnai,* Litovio, SU–234.911. – F-ino Aŭra *Astrauskajté* (16) ŝatas: kino, muziko, sporto, kol. sonbendoj, stereodiskoj, fotoj de popgrupoj, gekantistoj, bk de urboj, ktm. *Plungé* Str. J. Gagarino 7-7, Litovio, SU–235.640. – S-ino *Ušienė* Liuda (50) dentkuracistino, ktm, kun kuracistoj, (precipe japanoj) kaj ges-anoj pri int. temoj. *Utena* Sudeikiu gt. 3, Litovio, SU–234.910. – S-ro Gennadij *Briljov* (33) fervojisto, pri historio, E-literaturo, poezio, kol. bk, kalendaretojn. *Novgorod,* Musa Ĝalil str. 4-4. SU–173.003. – S-ro *Bebenin* Aleksandro (30) komencanto, pri foto, kino, sporto, ŝako. *Bor,* ul. Ostroveska 6a, kv. 1, SU–606.450. – F-ino Marzena *Szmyt* (17) pri vojaĝoj, mod. muziko. *Kościan,* Osiedle 30. PRL 65/5, PL–64-000. – F-ino Krystyna *Kempinska* (33) pri turismo, modo, *Kościan,* str. Sienkiewicza 8/4, PL–64-100. – F-ino Dorota *Chrobak* (25) div. temoj, precipe kun hungaroj. *Leszno,* str. Dzierzynskiego 13/2, PL–64-100. – Elena *Baltrušaitienė* (45) flegistino, pĉt, precipe pri naturo, bestoj; kaj filino Audronė (15) pri samaj. *Utena,* Komunary gt. 75-15. Litovio, SU–234.910. – Latva E-Klubo „Internacia Amikeco" pĉt, ktm, precipe kun gelernantoj kaj geinstruistoj. *Gulbene* pk. 1064, SU–228.700. – Novaj E-istoj (16–30) en okc. Siberio serĉas geamikojn ktm. Komuna adreso: *Surgut* Dum Kultury Energetik–Esperantista Rondeto, SU–626.400. – S-ro Aleksandr *Mikišev* (22) sperta E-isto ktm kun movadaj aktivuloj. *Perm* p.k. 184, SU–614.056.

LETERKESTO

Multaj abonantoj plendis, ke la perantoj tre malfrue ekspedis al ili nian pasintjaran n-ron 4, malgraŭ la redaktora mencio fine de p. 121.: „tiu ĉi numero espereble (!) atingos vin ĝis la mezo de septembro." Kiel frua estis tiu espero de la malfeliĉa redaktoro! Pro pluraj presejaj kaŭzoj la redakcio devis eĉ „ĝoji", kiam *komence de decembro* aperis tiu ege longe atendita – iom tro flava – numero. Ĝia ekspedado jam okazis haste, kaj laŭ la letere menciitaj alvendatoj ŝajne bonorde. La redaktoraro devas peti vian kompreneman indulgon pro la pasintjaraj malfruoj, okazintaj ekster ĝia propra agadsfero. – Memkompreneble ni plene likvidis la kontrakton kun tiu presejo. En la nuna jaro, espereble, la aperritmo de H.V. iĝos regula. Ni dankas pro via afabla pacienco!

Kafka, Jan, Klášterec, CS: Povas esti, ke la krucenigmoj – post daŭra praktikado – iĝas por multaj iom facila por solvi. Ankaŭ ni rimarkis tion, kvankam la facilecon kelkaj solvantoj menciis favore. Do por prezenti pli da zorgoj plezure al la solvantoj, ni estas klopodantaj laŭgrade progresante fari la enigmojn malpli facile solveblaj. Ankaŭ ĉi-rilate – krom aliaj rubrikoj – nia revuo espereble kontentigos la plezurojn de la legantaro.

Jozefo Major, Wellington, Nov-Zelando: Viaj detalaj rimarkoj pri nia revuo estas ĉiam bonvenaj kaj dankindaj, ni utiligos ilin. Same pri nia pretervido de precizeco (p. 97.), kio erare sugestis al kelkaj legantoj, ke la „vera nomo" de Julio *Baghy* estus Nádai. En la pli supra alineo estis ja menciita la Siberio-tema romano de Baghy, *La verda koro* (cetere nun reeldonita de HEA), kies heroo, laŭnome Nádai, estas identigebla kun la persono de Baghy; tamen sen tiu klarigo miskompreno estis ebla, precipe ĉe tiuj, kiuj ne legis tiun ĉarman romanon. (Cetere eĉ la avo de Julio portis la nomon Baghy.)

Karel Kraft, Borotice, CS: La obstakloj, kaŭzintaj tiom ofte malfruon, estas jam for, kiel legeblas komence de tiu ĉi *Leterkesto.* Ni amike dankas pro viaj pensoj pri H.V., kaj kio koncernas ĝian kvaliton (kaj aspekte, kaj enhave) ni daŭre serĉas manierojn por plibonigi ĝin. Ĝuste tial estas tre bonvenaj prudentaj rimarkoj kaj proponoj de la legantaro, kvankam – memkompreneble – restas la devo de al redaktoraro prijuĝi la uzeblecon de ili. Ni serioze konsideras ĉiun leteron, eĉ se ni ne kapablas ĉiujn aparte respondi. Kial prisilenti, ke nia *Leterkesto* rilatas ne nur al la laŭnome adresitaj, sed ofte reliefigas nian respondon al „tipaj" leteroj. Pri problemoj de kubo de *Rubik* vi ricevos pli detalan leteron.

Silvio Portellana, Milano, I: Ni vere bedaŭras, sed ĉimomente ni ankoraŭ ne konas senmanke ĉiujn (oficialajn) ekskursebloj n dum la Universala Kongreso en Budapeŝto. Tion kaŭzas ĝuste la granda internacia interesiĝo, pro kiu la organizantoj serĉas pliajn variantojn por prezenti vastan gamon da ekskursoj al la partoprenantoj. Jam evidentas, ke ne eblos aranĝi ilin sole dum certa tago, kiel estis kutime dum la kongresoj: ĉiutage oni devos servi al la kongresanaro kaj la familianoj elekteblajn programojn elveturante el Budapeŝto al diversaj vidindaj lokoj. La programon de ekskursoj oni baldaŭ ricevos laŭ la kutimaj manieroj. Certas jam, ke ili ne estos multekostaj! Feliĉan ĝisrevidon dum la UK!

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo Szabadság MGTSZ Gyál.

Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704

Szabadság MGTSZ Nyomda, Gyál — 83-219

31. mája 1983

FLAMAND CT 4656

Kolortelevidilo tipo CT 4636, konstruita en modul-sistemo, taŭga por programigo de 7 elsendstacioj.
Bildotubo: 56 cm, 110 „IN-LINE"

Ára: 23 600 Ft



ORION TV RADIO

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumtourist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.